

K. R.

LA REGO JUDEA



KAUNAS-LITOVUJO
ELDONO DE P. D. MEDEM
1923

K. R.

LA REĜO JUDEA

Dramo en kvar aktoj kaj kvin bildoj

El rusa lingvo tradukis

V. Devjatnin

Esperantan tekston trarigardis magistro de
teologio kaj akademiano

prof. A. Dombrovski

Rekomendita de Esperantista Literatura Asocio

Dua eldono



Kaunas-Litovujo

Eldono de P. D. M E D E M

1923



821.161.1-2 = 922

ANTAŬPAROLO.

Sub la literoj „K. R.“ sin kaŝas rusa vera poeto, bedaŭrinde mortinta, kies talenton rekonis kaj altŝatis ĉiuj seriozaj kritikistoj. Lia dramo „La Reĝo Judea“ estas ne nur fame konata literaturaĵo, sed ankaŭ pure scienca verko, ĉar la aŭtoro uzis por ĝi ĉiujn sciencajn fontojn.

La traduko estas farita de unu el la plej talentaj esperantistaj poetoj, V. Devjatnin. Ĝi estas mirinde konforma al la originalo.

En la redaktado partoprenis profesoro de teologio, akademiano A. Dombrovski, kies nomo garantias la verkon kontraŭ historiaj aŭ teologiaj eraroj.

La unua eldono de „La Reĝo Judea“ aperis ĝuste antaŭ la granda mondmilito, en Kovno. La eldonisto estis la konata esperantisto A. Nedoŝivin. La interrompitaj komunikiloj malebligis la disvastigon de la libro, kies granda kvanto pereis krom tio en Rusujo dum la civila milito.

„La Reĝo Judea“ estas adaptita al la scenejo kaj estis ludata en Rusujo antaŭ la milito.

„La Reĝo Judea“ havas intereson ne preterpasantan, sed ĉiaman, kaj devas esti rekonata kiel verko klasika por ĉiuj popoloj.

La supre dirita instigis min reeldoni la verkon kaj mi esperas, ke la apero de „La Reĝo Judea“ efektive respondos al deziroj de la esperantistaro.

Kaunas (Litovujo).
1923.

P. MEDEM.



PERSONOJ:

Pontia Pilato, prokuratoro de Judeo.

Prokulo, lia edzino.

Jozefo Arimatea } Sinedrianoj.
Nikodemo }

Johanino, edzino de l' dommastro de Herodo.

Prefekto de kohorto.

1-a tribunulo de legio.

2-a tribunulo de legio.

Centestro.

Sadukeo.

1-a }
2-a } fariseoj.
3-a }
4-a }

Simono Kirenano, ĝardenisto de Jozefo.

Aleksandro, sklavo de Prokulo, } filoj

Rufo, vilaĝano, } de Simono.

Lio, judeanino, sklavino de Prokulo.

Bartimeo, vilaĝano el ĉirkaŭaĵoj de Jeriĥo.

1-a }
2-a } mirhoportistinoj.*)
3-a }

*) Sankta mirho (slave „MVPPO“ estas miksaĵo el diversaj aromaj oleoj. Trad.

PERSONOJ

1-a	}	el popolo.
2-a		
3-a		
4-a		
5-a		
1-a	}	virinoj
2-a		
1-a	}	knabinoj — vendistinoj de floroj.
2-a		

Servanto de Jozefo.
 Voĉo de heroldo.
 Voĉo de levido.
 Siriaj sklavoj }
 Siriaj sklavinoj } dancantaj, sen paroloj.
 Militistoj, sklavoj, popolo.

Agado en Jeruzalemo; ĝi ampleksas unu semajnon de la triumfa eniro de Kristo Savinto en tiun ĉi urbon ĝis la tago de Kristreviviĝo.

Inter la unua kaj la dua aktoj pasas kvar tagnoktoj;
 inter la tria kaj la kvara — iom pli ol tagnokto.

AKTO UNUA.

Ĉe la urba muro; ĝi kun siaj turoj etendiĝas maldekstre, profunde malproksimen. En la muro sur la unua plano — pordego; estas vidata nur ĝia supra parto, kaj la malsupra estas kaŝita sub la scenejo. La vojo de la pordego, kuŝante pli malsupre, ol la nivelo de l' scenejo, en la komenco ne estas vidata kaj, suprenleviĝante iom post iom, samaltiĝas kun la planko de la scenejo pli dekstre ol ĝia mezo. Tie ĉi la vojo sin turnas maldekstren kaj, ĉiam plialtiĝante, venas al mallarĝa trairejo, farita en konstruaĵo sur la malantaŭa plano en la fundo, pli dekstre, ol la mezo. De tie ĉi la vojo abrupte sin turnas maldekstren kaj etendiĝas alte en la fundo de la scenejo paralele kun la antaŭscenejo, ĝis la urba muro, preterpasante kelkajn butikojn, en kiuj oni vendas diversajn komercaĵojn; tiuj butikoj limas la scenejon funde maldekstre; ilia plata tegmento dum la levado de l' kurteno estas dense okupita de popolo. La vojo, serpentiĝante, formas maldekstre placeton, en kies mezo kreskas antikva larĝbranĉa olivujo, post kies grandampleksa trunko povas sin kaŝi du homoj; inter la potencaj radikoj de tiu arbo troviĝas en la tero granda ŝtono, kiu servas kiel sidloko. De la placeto maldekstre,

aligita al la konstruaĵoj, kiuj etendiĝas laŭlonge de la urba muro, kondukas supren mallarĝa ŝtuparo kun ŝtona mureto; per la ŝtupoj de tiu ŝtuparo la placeto estas kunigita kun la vojo, preterpasanta super ĝi funde de la scenejo. Dekstre la placeto estas limigita de akvujo, kiu troviĝas sur la deklivo, formata de la vojo. Dekstre sur la unua plano, kontraŭ la akvujo, estas ejo de la centestro kaj de la militistoj-gardistoj; de la vojo al la pordo de tiu ejo kondukas kelkaj ŝtupoj, sed la pordo mem, lokita oblikve, ne estas videbla. La ejo de l' militistoj etendiĝas funden kaj kuniĝas kun la konstruaĵo, en kiu estas farita la jam dirita trairejo. Sur la placeto, kuŝanta apud tiuj konstruaĵoj, kreskas kelkaj maljunaj per polvo kovritaj cipresoj. Dekstre sur la antaŭscenejo, inter la vojo kaj ŝtupoj, kondukantaj al la militistoj, estas angulo samnivele de la planko de l' scenejo; en tiu ĉi angulo-ŝtona benko, apogita al la muro, kiu ĉirkaŭas la ŝtupojn. Vesperigas. Antaŭ leviĝo de la kurteno estas aŭdataj krioj de la entuziasmigita popolamaso.

SCENO UNUA.

La scenejo estas superplenigita de popolo. Multaj havas en la manoj palmajn kaj olivajn branĉojn kaj florojn. La deklivo de l' vojo ĝis la mallarĝa trairejo, farita en la konstruaĵo en la posta parto, estas superŝutita per floroj kaj per verdaĵo kaj estas sternita per supraj vestaĵoj. Malantaŭ la trairejo el profundo de l'

urbo estas aŭdataj iom post iom malproksimiĝantaj krioj. En la trairejo estas interpuŝiĝo. Inter komuna ĝoja kriado kaj gaja bruo aŭdiĝas apartaj voĉoj.

1-a el popolo.

Benata filo de David'!

2-a.

Hosano!

1-a.

Hosano! Izraela Reĝ'; venanta
En nom' de Di'!

2-a.

Hosano en ĉielo!

1-a.

Benita Reĝ'!

2-a.

En la ĉielo paco,
Kaj gloro supre!

1-a.

Estu do benata
En nom' de Dio alvenanta regno
De reĝ' Davido, nia kara patro!

3-a.

Sed kiu Li?

4-a (malestime).

Galilean'!

5-a (kun kredo).

Profeto!

1-a.

Jesuo Li, profet' el Nazareto.

1-a virino.

Jen hufa sign' de Lia azenino.

2-a.

Substernis mi la tukon; kaj sur ĝi
Ŝi paŝis kune kun la azenido.

1-a.

Al mi donacu tukon!

2-a.

Ne, mi ĝin
Konservos por memor' pri la Profeto.
(La bruo iom silentiĝas)

Bartimeo.

*) [Ne povas mi trairi! Tro malfrue.
Ĉi tie mi atendos. Kiam suno
Subiros kaj ekbrilos helaj steloj,
Ĉi tie Li reiros Betanion.
Al la disciploj Liaj mi aliĝos,

*) La presita en la krampoj dum prezentado sur scenejo estas forlasata.

Kaj sin rigardi longe jam permesos
Sanktul', al mi vidsenton redoninta.

(Trapasas knabinoj, vendistinoj de floroj
kun malplenaj korboj.)

1-a knabino.

Mi venos hejmen kun malplenaj manoj:
Popolamaso miajn florojn prenis
Kaj al Profet' sub la piedojn ĵetis.

2-a.

Ne plendu, kara, ke laborenspezo
De l' tuta tag' de ni perdita estas.
Memvole Lian vojon mi eksternis
Per la rosplenaj belaj kampaj floroj.
Ja ĉiujn rozojn kaj liliojn viajn
Akceptos Dio, kiel la oferon,
De vi al la Profeto donacitan.
Liliojn kampajn amas Li; ne vane
Pri ili diras Li, ke eĉ la reĝo
Mem Salomon' en sia granda gloro
Ne povis tiel lukse sin vestadi
Per oro kaj purpuro, kiel ili.]

Sadukeo.

Li estas mensogulo! Vi ne kredu,
Ke almozul' deĵetos jugon Reĝan
Kaj, ekreginte en la urbo sankta,
Eksidos sur la trono de Davido.

Bartimeo.

Davido ankaŭ estis ne nobela:
Paŝtisto hieraŭ — morgaŭ reĝo.

1-a fariseo.

Malestiminda! Vi kompari volas
Vagulon Galilean kua Davido!

2-a el popolo.

Satanojn Li per vorto kvietigas ...

5-a.

La leprigitojn ankaŭ Li sanigas ...

1-a.

La Instruant' mortintojn revivigas ...

Sadukeo.

Fabeloj virinaĉaj. Malsaĝuloj
Nur povas kredi tiujn ĉi miraklojn.

1-a virino.

Ne povas ni ne kredi, se publike
Al blindnaskito Li la vidon donis ...

2-a.

Junulon en Nain' Li revivigis,
Unikan solan filon de l' patrino.

1-a el popolo.

En Galileo, en urbeto ia, —
En kia, mi la nomon ne memoras, —

Sinagogestro lairo loĝas;
Filinon lian de malsan' mortiga
Li savis ...

2-a.

Vidis mi en Betanio
Hieraŭ Li mortinton revivigis.

1-a.

[Pri kio ni disputas: Bartimeo,
Rakontu, kiel Li vin en Jeriĥo
De la blindeco via liberigis.

Bartimeo.

Ok jaroj eble jam forpasis, kiam
Difektis mi okulojn dum draŝado;
Doloris ili longe; ĉiutage
Mi pli malbone vidis — kaj blindiĝis.
De tiam mi fariĝis almozulo
Kaj per almozo nur mi devis vivi.
Jen foje ĉe l' pordego de Jeriĥo
Sidinte, el la urb' mi aŭdis bruon:
De maro ribelemaj ondoj kvazaŭ
Atakis akre la rokplenan bordon.
La bruo de l' popol' alproksimiĝis,
Kaj mi en krioj kaj ekklamoj aŭdis
La nomon de Jesuo Nazareta.
Komprenis mi, ke antaŭ mi trapasas
Profeto tiu virta Galilea,
Nomata laŭ popola fam' Mesio,

Savanto de l' malsanaj kaj kripluloj,
 Amiko de l' malfortaj, almozuloj.
 Kaj jen ekvokis mi al Li kun larmoj:
 — „Ho, Filo de David', Jesuo, savu!“ —
 Min oni vane volis silentigi,
 Mi ĉiam kriis. Kaj aliaj diris:
 — „Li haltis; vi vin levu pli rapide,
 Ne timu, iru: Li ja vin alvokas.“ —
 Forprenis mi rapide supran veston,
 Al Li rapide kuras, genufleksas
 Kaj aŭdas voĉon karesantan, mildan:
 — „Vi kion volas?“ — Mi al Li respondas:
 — „Mi volas ree vidi, mia Majstro!“
 Kaj jen la sama ĉarma voĉ' eksoniŝ —
 Ĉis nun ĝi sonas en oreloj miaj:
 — „Leviĝu! Vin la kredo forta savas!“
 Kaj mi ekvidis.

2-a virino.
 Kiel do ne kredi!

Sadukeo.
 Vi kredas al vaganto, almozulo!
 Min ne konvinkos tiu ĉi sonĝisto,
 Freneza, en maldormo deliranta.]

2-a fariseo.
 Li estas mensogulo, deloganto,
 Sed ne profeto kaj ne fil' Davida.
 (Ekscitita popolamaso atakas la sadukeon
 kaj fariseojn.)

Bartimeo.
 La Majstron nian li ofendis.

1-a virino.
 La Profeton
 Insultas li!

3-a fariseo.
 Silentu! Kiel rajtas
 Vi Lin profeto nomi?

4-a fariseo.
 Estas falsa
 Profeto Li!

1-a el popolo.
 Kuraĝas vi mallaŭdi
 Senditon Dian!

1-a fariseo.
 Kaj ĉu mem vi rajtas
 Publike nomi Lin sendito Dia?

2-a el popolo.
 Samariano!

3-a.
 Hundo!
 5-a.
 Malpiulo!

2-a fariseo.

For!

1-a el popolo.

Per ŝtonoj ilin!

Sadukeo (alkurinte al la ejo de l' militistoj).

Tien — ĉi!

(Popolo kaptas ŝtonojn, minacante sadukeon kaj fariseojn.)

1-a fariseo (ankaŭ apud la ejo de l' militistoj).

Nin helpu!

SCENO DUA.

(Pro la krioj el la pordo elkuras roma gardistaro, komandata de l' centestro.)

Centestro.

Pri kio bruas vi?

Sadukeo.

Ho, nobla estro,
Disputas ni kun la popolamaso:
Proklami kiel reĝon ĝi deziras

Vagiston, almozulon Nazaretan;
Kaj ni — estimas ni nur unu reĝon! ...

1-a fariseo.

La vian kaj la nian potenculon ...

2-a.

Tibero vivu!

3-a.

Multajn, multajn jarojn,
Kaj glor' al reĝo!

Bartimeo (flanken)

Ho, hipokrituloj!

1-a el popolo (same)

Flatuloj!

2-a.

Ili estas pretaj vendi
Popolon, pro la propra viv' tremante.
(Plendmurmurado de l' popolamaso.)

Centestro.

Ne povas ektimigi nian reĝon
Profeto galilea sendanĝera.



Ĉi tie oni ĉiam malpaciĝas. (Al fariseoj.)
Sed ĉu ne vi komencis la malpacon,
Popolon ekscitinte per mallaŭdo
De la Profet'? Pli bone iru hejmen.

(Sadukeo kaj fariseoj rapide foriras en
la urbon.)

SCENO TRIA.

Centestro (al la popolo).

Silentu (al la militistoj).

Se iu havas ŝtonon en la manoj,
Lin kaptu kaj katenu. Nu, disiru!

(La militistoj kaptas kelkajn kaj forkon-
dukas. La centestro foriras post ili. La
popolamaso diskuras kriante.)

SCENO KVARA.

1-a el la popolo.

Ho, perfortuloj!

2-a.

Hundoj!

3-a.

Malbonuloj!

4-a.

Ĉu longe ni toleros jugon roman?

5-a.

Ho, se de malpiuloj liberigus
Mesio nin!

1-a virino.

Jesuo baldaŭ venos —
Kaj liberigos nin ...

2-a.

Ĉu ni ĝisvivos?

(La scenejo malpleniĝas. Bartimeo foriras
maldekstren. La suno subiras. Sur la scenejo
regas ruĝeta lumo. Eliras, interparolante,
Jozefo kaj Nikodemo.)

SCENO KVINA.

Nikodemo.

[La vortoj de l' profeto Zahario
Efektiviĝis: „ĝoju, ho, Ciono!
Triumfu gaje, ho, Jeruzalemo!
Savanto via venas, via Reĝo,
Savanta ĉiujn, Justemulo milda;

Li venas, sur la azenin' sidante
 Kun azenido, filo de l' subjuga".
 Sed duboj ĉiam la animon pikas:
 Ho, se je Li mi ankaŭ povus kredi!]
 La kvara jaro pasas jam, Jozefo,
 De kiam Li Jeruzalemon venis
 Al festo. Lia pura instruado
 Kaj Liaj mirindaĵoj, kiujn fari
 Neniu povus, se kun Li mem Dio
 Ne estus, jam de tiam min inspiris,
 Ke estas Li de Dio alsendita.
 [Jam tiam mi sekrete dum la nokto
 Vizitis Lin, kaj admirindajn vortojn
 De Li mi aŭdis. Li al mi parolis,
 Ke tiu ne ekvidos Regnon Dian,
 De supre, kiu per Spirit' kaj akvo
 Ne renaskiĝos.

Jozefo.

Jes, neordinaraj
 Ĉi tiuj vortoj estas! Tamen, kiel
 Naĝanto vidas bordon tra nebulo, —
 Mi tra nebulo de misteraj vortoj
 La veron Dian ĉiam bone sentas ...
 Daŭrigu tamen pluen, Nikodemo.

Nikodemo.

Spirito spiras, kie volas; voĉon
 De Li ni aŭdas, sed ne scias, kie

Ĝi estas kaj foriras poste kien.
 Al ĉiu tiel estas, se naskiĝis
 Li de Spirit'.

Jozefo.

Sed kiel ĝi okazas?

Nikodemo.

Kun mi parolis Li pri tio, kion
 Li scias, atestante, kion vidas.
 Nekolerema, milde Li riproĉis,
 Ke atestadon Lian ternaskitoj
 Akcepti ne deziras. Li parolis
 Pri la teraĵoj, tamen ni ne kredis, —
 Do, ĉu ni kredos, se al ni parolos
 Li pri ĉielo? Jen aperis lumo,
 Sed por la mond' mallumo estis
 Pli ĉarma, ĉar malbonaj estis homoj.
 Malbonfaranto malamegas lumon,
 Al ĝi ne proksimiĝas, ĉar li timas,
 Ke lumo malbonfarojn liajn montros,
 Sed bonfaranto mem al lumo iras,
 Por ke kun Dia help' faritaj bonaj
 Aferoj liaj estu klarigitaj.

Jozefo.

Ho, kiel funde en animon mian
 Penetras Liaj vortoj signifplenaj!

Vi ripetadas ilin kun respekto,
Tri jarojn portas ilin en la koro,
Kredonta estas vi instruon puran,
Vi mirakliston vidas en Jesuo,
Sed Lin Mesio vi ne opinias?

Nikodemo.

Pro tio suferadas mi profunde,
Ke kore mi delonge Lin akceptas,
Sed menso kaj scienco ne permesas,
Ke kredu mi amatan mian revon.
[Ĉu povas mi, rabeno Izraela,
Neante la profetojn kaj la leĝon,
Forgesi, kio ilin kontraŭdiras,
Kaj kun la konscienc' pacigi dubojn?]
Jesuo Nazareta estas filo
De ĉarpentisto, sed Savonto nia,
Espero Izraela, de Moseo.
Mesio jam delonge promesita,
En Betlehemo naskiĝonta estas
Kaj venos el la gento de Davido.

Jozefo.

Ne scias mi la leĝon kaj profetojn ...
[Kaj estas ne por mi saĝec' ilia.
Sanktecon mi ilian tre respektas
Kaj kredas al la patraj tradicioj.]
La rakontadoj de la Sankta Skribo

La stelojn en ĉielo memorigas:
Dum nokto el bluaĵo malproksima
Enigme kaj mistere ili verŝas
Al ni briladon sian sur la teron;
Ravitaj per belec' nepereema,
Ni tremetante ilin rigardadas,
Sed voĵ' ilia en altaĵ' senlima
Kaj multnombrec' ne estas kompreneblaj,
Kaj luma ar' ilia estas fremda.
Simile al stelesploristo, kiu
Scivole legas fajran ĉiellibron,
Ellernis vi la leĝon kaj profetojn;
Sed mi fordonas min al sent' anima,
Al la impulsoj koraj mi obeas.

(Aperas Simono Kirenano, kondukante
azeninon kun azenido,*) kaj Rufo).

SCENO SESA.

Simono (al Jozefo).

Salutas vin, sinjoro mia bona!

Jozefo.

De kie venas vi?

Simono.

Mi laboradis

En vinberejoj kaj en kampoj viaj.

*) Azenino kun azenido sur la scenejo ne aperas.

Subite en la urb' mi aŭdas kriojn
 Kaj bruon ian: ja ĝardeno via
 Proksima estas de la urba muro —
 Rapide tiam venis mi la urbon
 Kaj sur la placo apud templ' ekvidis
 Popolamason grandan; ĝi kun ravo
 La Majstron nian ĝoje akompanis.
 Antaŭe rajdis Li, kaj mi ekkonis
 Sub Li la azeninon kun la ido.

Nikodemo.

Sed kiel povis Li ricevi ilin?

Rufo.

Sinjoro, jene ĝi okazis: hejme
 Mi estis sola. Mia patr' forestis, —
 Mi aŭdis paŝojn, kaj tra la fenestro
 Ekvidis vojŝanĝon polviĝantan. Poste
 Al la baril' du iaj viroj venis
 Kaj de la trunko de figarb' larĝbranĉa
 Intencis azeninon nian preni.
 — „Vi kion faras?“ — mi al ili kriis:
 Sed ili tre trankvile min respondis:
 — „La Majstr' bezonas azeninon vian“. —
 Mi ekrigardis: jen de Betfageo
 Kun aro da disciploj iris Majstro.
 Mi mem, kaj patr', kaj frato Aleksandro
 Jesuon ŝatas. Tial mi volonte

Permesis nian azeninon preni.
 La Majstr' eksidis tiam kaj veturis
 Trans la oliva mont' al nia urbo.
 Post Li mi ankaŭ iris. De sur monto
 Malsupreniris ni, kaj jen aperis
 Jeruzalemo, kvazaŭ sur manplato,
 Brilante ore en radioj sunaj ...
 [Glorante Dion, kantis ni: „Hosano“.
 Aŭdinte kanton, el la urb' renkonten
 Al ni popolo iris; ĉiam kreskis
 Popolamas'. Al la Profeto ĉiuj
 Sub la piedojn jetis vestojn, florojn.
 Apenaŭ venis Li al la pordego,
 Jeruzalemo tuta ekmoviĝis,
 Kaj ĝoje sonis krio de l' popolo:
 — „Hosano, Izraela Reĝ', hosano!“ —
 En la amas' eminentuloj estis;
 Kun sent' malbona kaŝe rigardante
 Virtulon nian, ili ĉiam flustris
 Al Li en la orelon kun kolero:
 — „Disciplojn silentigu, Vi, ho Majstro,
 Kaj Li respondis: — Mi al vi ja diras:
 Se disciplaro Mia eksilentus,
 La ŝtonoj tiam laŭte ekparolus!“]

Simono.

Li haltis ĉe la pordo de la templo,

Kaj mi alkuris al la Majstro mem
 Kaj je la brid' la azeninon tenis,
 Dum Li de ŝi foriĝis. Min rekonis
 La Majstro tiam, kun rideto milda
 Min ekrigardis fikse kaj eldiris:
 — „Al Mi komplezon unu vi jam faris;
 La duan Mi de vi atendas baldaŭ“. —
 Dirinte tion, Li tre malrapide
 Ekmarŝis laŭ marmoraj larĝaj ŝtupoj
 En templon. [En la fako Salomona
 Neplenaĝuloj Lin ĉirkaŭis. — Amas
 Infanojn Li kaj tre favoras ilin,
 Kaj la infanoj Lin tre ŝatas. — „Gloro
 Al filo de David!“! — ekkantis ili,
 La patrojn kaj la fratojn imitante.
 Kaj kiam la ĉefpastro, indignante,
 Lin rimarkigis: — „Ĉu do Vi ne aŭdas,
 Ke knaboj kantas?“ — la Profet' respondis
 Per vortoj de Davido, nia Reĝo:
 — „El buŝ' de l' knaboj kaj de l' suĉinfanoj
 La laŭdo sonas“...] Mi ekmarŝis hejmen,
 Pensante ĉiam, vane divenante,
 Ankoraŭ, kian do mi baldaŭ povas
 Komplezon fari al la Dia homo.

Rufo.

Paroloj Liaj ĉiam plenumiĝas.

Simono.

Ni iru hejmen, Rufo. Bonan nokton!
 Vin gardu Dio!

Jozefo.

Pac' al vi. Adiaŭ!

(Simono kaj Rufo foriras. Jozefo kaj Niko-
 demo sidiĝas sub la olivujo maldekstre).

Nikodemo.

[Envie kaj kortuŝe mi observas
 La naivecon de la vilaĝanoj.
 Laŭ voko de la koro ili kredas,
 Sen duboj, tute blinde. Kvazaŭ birdoj
 Ĉielaj aŭ sovaĝaj kampaj bestoj
 Ne frapas ili per la saĝ' sciema
 Fermitan pordon de l' palac' scienca.
 Al ili vivo estas klara, timon
 De l' mort' ne scias ili, kaj enigmo
 De la estad' por ili ne ekzistas.

Jozefo.

Popolo kredas en Jesu' Mesion,
 Sed niaj fariseoj, sadukeoj,
 Leĝistoj kaj kleruloj tre versaĵne
 La kredon de l' popolo ne akceptos.
 Ne ŝatas ili predikadon Lian.
 Doktrino pri la amo kaj pardono

Al si sensentajn korojn ne allogas,
Kaj fierec' ilia, profitemo,
Hipokriteco ne toleros lumon.
Kolero en la sinedrio kreskas,
Mortiga batalado komenciĝis,
Kaj do Jesuo estas pereonta].

SCENO SEPA.

(Eniras sadukeo kaj kelkaj fariseoj. Ili
ne rimarkas Jozefon kaj Nikodemon).

Sadukeo.

Ĉi tie pri Jesuo ni parolos
Libere ...

Nikodemo.

Pri Jesuo? Ĉu vi aŭdas,
Jozefo?

Jozefo.

Jes, mi aŭdas. Ni de ili
Konataj estas. Tamen mi ne volas
Renkonti ilin: mi de ili bonon
Ne kredas. (Li intencas foriri.)

Nikodemo (haltigante Jozefon).

Tss! ...

1-a fariseo.

Mi en la templ' ne estis. Kio
Okazis tie, diru?

Sadukeo.

Jen, aŭskultu:

Ĉi tiu frenezulo, galilea
Profet', aŭ simple — almozul', vagulo ...

1-a.

Mi scias. Pluen!

Sadukeo.

En la templo venis ...

2-a fariseo.

Eltrovis ŝnuron, ĝin kunvolvis vipe
Kaj, minacante, bone ekmastrumis:
Forpelis aĉetantojn kaj vendantojn.

3-a.

Al la kolombvendistoj Li renversis
La benkojn ...

4-a.

Al la monŝanĝistoj ankaŭ
La tablojn ...

Sadukeo.

Tra la templon ne permesis
Al iu ajn traporti ian ajon ...

2-a.

Kaj kvankam tie estis la ĉefpastro, —
Li paroladis, rememorigante
Al la popol' la vortojn de Jesajo:
— „Por ĉiuj Mia domo estas domo
De l' preĝo; tamen vi aranĝis tie
La neston de rabistoj“.

1-a.

Estas troe!

Ni kvietigu Lin!

2-a.

Arogantulo!

1-a.

Ni venĝopunu Lin!

Sadukeo.

Pro tio nome
Mi el la urbo vokis vin. Ĉi tie
Libere, malproksime de l' popolo,
Sekvanta la Mesion uzurpulon

Simile al ŝafaro malsaĝega,
Prijuĝos ni pli bone, kion fari.
Kun vi, la fariseoj, ni sendube
Tre ofte ne deziras pace vivi.
Sed nun por ni kaj vi Jesuo estas
Danĝera: ni do devas unuiĝi.
Vi vidas, ke Lin venki ni ne povas:
La tuta mond' Lin sekvas pro mirakloj
De Li farataj. Se do ni Lin lasos
Libera, tiam la popolo tuta
Ekkredos Lin, kaj poste, povas esti,
Proklamos Lin la reĝo en Judeo.
Romanoj tiam senrevene prenos
La tutan landon nian kaj detruos
Cionon kaj la templon Salomonan.

1-a.

Ĉu ne pli bone estas por popolo,
Se la galilean' pereos sola,
Ol ĉiuj ni pro Li pereos?

2-a.

Certe.

Almenaŭ tiun liberecon savi
Ni devas, kiun havas ni de Romo!

3-a.

Judeo nia por eterne vivul

4-a.

Kaj vivu la popolo Izraela!

1-a.

Nazaretano mortu!

2-a.

For profeton!

3-a.

Pereu do Galilean'!

4-a.

Al morto!

Sadukeo.

Nenion vi komprenas! Eĉ tuŝeti
 Ni Lin ne povas nun. Ja la popolo
 Pri Li nur revas. Mem vi povis vidi
 Hodiaŭ, kiel la popolamaso
 Malsaĝa sekvis Lin entuziasme,
 Per ŝtonoj ĝi mortigus tiun, kiu
 Ne honorigus nun idolon ĝian.
 Atendu nur: forpasos tiu flamo.
 Kaj se sen la popolo ...

1-a (duonvoĉe).

Mi komprenas!

Sekrete ...

2-a (same).

En dezerta loko ...

3-a (same).

Nokte ...

1-a.

Senbrue, kaŝe ...

Sadukeo.

Kaptos ni Jesuon ...

1-a.

Kondukos al la juĝ' de la ĉefpastro ...

2-a.

Eltrovos atestantojn ...

3-a.

Kulpon trovos ...

4-a.

Kaj al la mort' senpene Lin kondamnos.

Jozefo (mallaŭte al Nikodemo).

Ho, malnobluloj! Monstroj, mortigistoj!
Aŭskulti ilin — mi ne havas fortojn.

Nikodemo (same).

Silentu! Ni ne devas enmiksiĝi!

Sadukeo.

Kaj la popolo sama, kiu kuris
Post Li hodiaŭ, kiel post la Reĝo,
Idoladoris Lin, sendube kredos
Al tiuj, kiuj la Mesion juĝos
Kaj eĉ postulos Lian ekzekuton.

2-a.

Jes, jes, vi estas prava: la popolo
Ŝanĝema estas, kiel la vetero.

1-a.

Sed por Lin kapti en dezerta loko,
Ne ĉe l' popolo, devas ni ekscii
Pri tio, kie Li pasigas nokton ...

Sadukeo.

Mi havis tempon jam ekscii tion.
Mi konas el disciploj Liaj unu —

Judason, el la gent' Iskariota.
Sonor' arĝenta por oreloj liaj
Pli ĉarma estas, ol la instruado
Pri neprofitemeco. Mi promesis
Al li sonoron tiun ĉarman; kvankam
Ni pri la prezo ne interkonsentis,
Sed mi jam vidis lian avidecon.

2-a.

Ho, se pli baldaŭ povus ni finfini
La malpiulon!

3-a (al sadukeo).

Mi jam estas preta

Vin sekvi.

1-a, 2-a kaj 4-a.

Ankaŭ mi!

Nikodemo (al Jozefo).

Mi iras hejmen.

Sadukeo.

Mi kore dankas vin pro la konsento
En la afero justa. Sed mi petas —
Silentu.

1-a.

Kia estas tie bruo?

(Sklavoj portas el la urbo sur la portilo Prokulon; sur alia portilo oni portas Johananon. Nikodemo, kaŝante sin post la olivujo, foriras en la urbon).

SCENO OKA.

2-a fariseo.

Edzinon de Pilato oni portas.

3-a.

Kun kiu estas ŝi?

2-a.

Kun Johanino,
Edzin' de Ĥuzo: ĉe Herodo estas
Li domadministranto. Kun Jesuo,
Kun la disciploj kaj kun Magdaleno
El Galileo ŝi ĉi tien venis ...
Ŝi la Romanojn ne malŝatas, ofte
Vizitas ilin.

Sadukeo (humile salutante).

Al matron' saluton!

1-a fariseo.

Saluton, ho, Prokulo!

2-a.

Fartu bone!

3-a.

Feliĉa estu!

4-a.

Pacon kaj la benon!

Prokulo.

Mi dankas vin! Mi ankaŭ vin salutas.

(Sadukeo kaj fariseoj foriras en la urbon.)

SCENO NAŬA.

Jozefo (irante renkonte al Prokulo kaj per signo haltigante
la portistojn).

Mi ne kuraĝus veni kun saluto,
Se eksterordinare grava kaŭzo
Min urĝe ne devigus vin tedeigi.

Prokulo (al la portistoj).

Starigu tie sub la olivujo
Portilon mian. — Pac' al vi, Jozefo!
Kutimis mi en bela Kesario
Al la vastaĵo de dezertaj ondoj.
Veninte tien ĉi, mi sufokiĝas
En polva urbo; ekster ĝiaj muroj
Plenbruste volus mi ekspiri
Aeron puran de la kampoj larĝaj;
Sed ankaŭ tie ĉi mi vin aŭskultos.

Jozefo.

Mi scias, sinjorino, ke flamkore,
Kuraĝe ĉiam veron vi defendas,
Kaj pro anim' sentema ne permesos,
Ke la Virtul' senkulpe suferadu.

Prokulo.

En ĉia tempo, ĉie vin, Jozefo,
Mi estas ĝoja vidi. Kaj se donos
Al mi vi la okazon — bonon fari,
Pro tio povas mi nur kore danki.

Jozefo.

Sendube vi, Prokulo, pri Jesuo
El Galileo aŭdis jam.

Johanino.

Ho, Diol

Prokulo.

Jesuo! Ĉu vi aŭdas, Johanino,
Li ankaŭ nun pri Li al mi parolos!
Kioman fojon aŭdas mi hodiaŭ
Ĉi tiun nomon! Antaŭ nur minuto
Ĉu mi kun vi pri Li ne paroladis?
Mi multe aŭdis jam pri Li, Josefo,
Kaj ĉiam flame mi Lin volis vidi,
Sed mia revo ne efektiviĝis.
Kaj jen hodiaŭ, — antaŭ unu horo, —
Laŭ strat' mallarĝa Li sur azenino
Rajdinta estis preter mia domo.
Komence mi ne vidis la vizaĝon, —
Ĉar Lia kapo estis mallevita.
Sed kiam estis Li ĉe mia domo,
Al mi Li ekdirektis la okulojn
Kaj longe exploreme min rigardis.
Neniam mi ĝis nun ankoraŭ vidis
Vizaĝon tiel belan: ĝi lumiĝis
Per la esprimo ĉarma de majesto,
Mildeco kaj malĝojo delikata.

Jozefo.

Vi ĵus, al loko tiu ĉi veninte,
Renkontis kelkajn judojn eminentajn.

Kaj kelkajn nur minutojn antaŭ tio,
De ili ne vidata, mi ekaŭdis,
Ke ili inter si komploton faris,
Por kapti Lin, malice kalumnii
Kaj mortkondamni.

Johanino.

Ĉu ĝi povas esti!

Prokulo.

Per kio Li meritis morton?

Jozefo.

Oni

Al juĝo pretoria Lin prezentos.
Vi scias, sinjorino, ke ĉi tie
Nur prokurist' konfirmas mortverdikton...
En viaj manoj do, Prokulo, estas
La vivo de Jesuo. Al la edz' vi diru,
Ke pro envio nur kaj pro kolero
Sen kulp' kuraĝis ili Lin kondamni.
Ja via edzo estas la romano
Kaj ne permesos, ke la roma leĝo
Malhonorita estu, kaj ke venku
La veron kalumnio aroganta.

Prokulo.

Mi diros al la edzo, kion aŭdis
Mi ĵus de vi.

Jozefo.

La suno jam subiris.
Adiaŭ. Estas tempo, por ripozi.
Mi iros. Do, saluton mian koran!

Prokulo.

Ĝis la revid', Jozefo. Bonan nokton!
Se pri Jesuo vi ekscios ian
Novaĵon, tuj, mi petas, min vizitu
En pretorio. Mi en ĉiu horo
Vin ĝojas vidi.

Jozefo.

Restu kun la paco! (Foriras).

SCENO DEKA.

Prokulo (al Johanino).

Post kiam mia edz' ĉi tien venis,
Veturis mi kun timo en Judeon;
Ĉi tie mi barbarojn kredis trovi,
Nepacigeblajn kaj fanatikulojn.
Sed jen ekkonis mi Jozefon, poste
Kun vi mi amikiĝis, Johanino...
Mi vidas — vi kaj li tre multe ŝatas
Ĉi tiun Majstron el la Galileo.
Per kio do allogis vin Jesuo?

Johanino.

Vi mem, Prokulo, Lin hodiaŭ vidis...
Ĉu en la koro via vi ne sentis
Ĉarmecon de figuro Lia bela?

Prokulo.

[Mi min de vi ne kaŝos, Johanino:
Post kiam Li sur mi okulojn fiksas,
Min kvazaŭ eterneco ekrigardis,
Kaj en okuloj Liaj mi tralegis
Tielan profundecon de la amo
Ĉiela kaj senfinan bonkorecon,
Ke ĝis la mort' mi tion ne forgesos!]

Johanino.

Kaj vi demandas, kial Li allogas?

Prokulo.

Ne povas nur la sento min forvenki;
Per la racio volas mi konscii,
Per kio venkas Li la homajn korojn,
Per kia forto ilin Li allogas.
De kie estas Li? Gepatroj Liaj?
Ĉu ilin konas vi?

Johanino.

El Galileo
Devenas ili. Urbo Nazareto.

La patr' de longe mortis. Oni diras,
Ke estis li el nobla gent' Davida;
Naskiĝis li kaj vivis en mizero,
Li estis ĉarpentisto kaj la Filon
Instruis pri metio tiu. Kiam
La patro mortis, restis Li la sola
Kaj per la ĉarpentad' rimedojn donis
Jesuo al Patrin' Mario.

Prokulo.

Ido

De l' reĝoj, sed malklera ĉarpentisto,
Ĉu povas Li la homajn mensojn regi?

Johanino.

Li legas en la koroj; ĉiujn niajn
Sekretojn scias Li. Per granda forto
De miraklist' Li estas provizita.

Prokulo.

De vi mi ofte aŭdis, Johanino
Pri mirindaĵoj Liaj; sed mirakloj
Min ne konvinkos. Ni en Romo ankaŭ
Pri tre mirindaj resanigoj aŭdas
Ĉe temploj de Izid' aŭ Eskulapo.
Bezonas mi pli fortajn argumentojn,
Por ke kuraĝe povu mi ekkredi
Diecon Lian. Sed daŭrigu pluen.

Vi ĵus la nomon de Patrino Lia
Al mi menciis. Ĉu de vi konata
Ŝi estas kaj ĉu longe, Johanino?

Johanino.

Ho, jes, Prokulo, mi Ŝin longe konas
Kaj tre feliĉa estas, ke mi povis
Al Ŝi alproksimiĝi. Ne ekzistas
Pli ĉarma inter la virinoj. Kiel
Dum la printempo, kiam la naturo
Rapidas kvazaŭ aperigi kune
Plenecon tutan de ĉarmaĵoj siaj,
Ekblovas kiam varmo bonodora,
Kaj la unuaj floroj ekbriletas,
Kaj najtingaloj en arbaroj kantas,
En la figuro de Mario same
Kreint' kunigis ĉiujn perfektaĵojn:
Purecon helan de maten' sennuba
Kaj trankvilecon de krepusk' vespera,
Kaj delikatan brilon de la luno,
Kaj la virgecon de lilioj kampaj,
Kaj la mildecon ĉarman kolombinan.
Ne vane kun lilio blanka foje
Al Ŝi alflugis ĉielan'flugila
Antaŭ la temp' de Patriniĝo ŝia
Kaj pri naskiĝo de Jesu' anoncis.
[De tiu temp' virinoj Nazaretaj
Vidadis ofte, — kaj mi mem rimarkis,
Ne unufoj' kun Ŝi renkontiĝante, —

Ŝi kiam iras per facilaj paŝoj
Kun kruĉo de sur monto al la putro,
Aŭ kiam ŝpinas Ŝi en la ĝardeno,
Aŭ dum la sunsubiro sur perono
Kun najbarinoj Ŝi interparolas, —
Subite jen vizaĝo Ŝia eklumiĝas, —
Forgesas tiam ĉion Ŝi, al iu
De ni nerimarkebla Ŝi direktas
Rigardon Sian kaj murmuris ion:
Do, kun anĝeloj Ŝi interparolas.

Prokulo.

Kun kora tremo kaj kun kortuŝeco
Rakonton vian belan mi aŭskultas;
Ĉi per enigmo de misteraj faktoj
Kaj per trakvila ĉarmo en animo
Ektuŝis iajn nekonatajn kordojn:
Kaj kvankam nin konfuzas mirindaĵoj.
Sed ĉu kuraĝos ni fiere nei
Komunikiĝon de l' videbla mondo
Kun nevidebla mondo de l' ĉielo?

Johanino.

La nevidebla por malvirtaj niaj
Okuloj estas tute atingebla
Por la rigard' netera de Mario].

Prokulo.

El ili kiu estas pli feliĉa:

Mario, kiu naskis tian Filon,
Aŭ Li, amante la Patrinon tian?
[Rakontu do ankoraŭ.

Johanino.

Oni diras,
Li jam dum infanec' miraklojn faris:
Kun knaboj el argilo Li birdetojn
Skulptadis; ĉe aliaj ili certe
Argilo restas; sed en Liaj manoj
Ektremas ili kaj, ekviviĝinte,
Ekflirtas kaj kun kant' ĉielen flugas.
Pli poste, — jam junulo belstatura
En metiejo foje Li laboris,
Rabotis kaj la rabotaĵoj falis,
Sin ringe kunvolvante, sur la plankon.
Vidvino tre malriĉa preteriris
Kaj almozpetis. Juna Ĉarpentisto
Komencis serĉi, petis la Patrinon,
Sidantan ĉe ŝpinado, — sed nenion
Li povis trovi en la tuta domo.
Li tiam, ridetante, rabotaĵon
Donacis al vidvino; kaj subite
Fariĝis oro tiu rabotaĵo].

Prokulo.

Sed ĉefe mi deziras scii: kion
Instruas Li?

Johanino.

Li vokas al la pento;
Al ni ordonas ami malamikojn
Kaj proksimulon, kiel nin mem. Pagi
Per bono kaj favoro Li instruas
Al malbenantaj nin kaj malamantaj.
Feliĉon Li promesas kaj la Regnon
Ĉielan al pro vero forpelitaj,
Al avidantaj ĝin kaj soifantaj,
Al puraj koroj, mildaj, pacfarantoj,
Al bonfavoraj kaj al mizeruloj.
Konsolon Li promesas al plorantoj.
Al ĉiuj, kiujn oni kalumnias
Pro Li kaj malbonfaras, Li parolas:
— „Vi estu gajaj kaj ekĝoju, tial
Ke estos granda via rekompenco.
Lumiĝu via lumo antaŭ homoj,
Ke ili vidu viajn bonajn agojn,
Ke honorigu ili kaj glorigu
Eternan vian Patron en ĉielo“.

Prokulo.

Parolojn viajn belajn mi atentis,
Kaj kvazaŭ svenas dolĉe la animo;
Karesas ili, tuŝas kaj ekscitas,
Parencon ion mi en ili aŭdas,
Kaj ŝajnas, ke al mi jam ili sonis

En ia tempo, ie, kiel sonĝo,
Aŭ kiel la lulkanto de l' patrino ...

(De malproksime el la urbo, komence tute
mallaŭte, sed iom post iom ciam pli laŭte
eksonas la kantado de la disciploj de Jesuo *).
Jam mallumiĝis).

SCENO DEK UNUA.

Prokulo.

Jam krepuskiĝis ... La unua stelo
Ekbrilis en ĉielo ... Min atendas
Pontio. Estas tempo iri hejmen.
Sed kiaj sonoj flugas el la urbo,
Tuŝante en silento mian aŭdon?
Mi aŭdas, tie oni kantas ŝajne?
Jes, oni kantas: mi distingas klare
La virajn voĉojn.

*) Kanto de l' disciploj de Jesuo.

Ho, Dio! De l' savo Sinjoro,
Al Vi mi la manojn etendas,
Kaj varman preĝadon el koro
Al Vi ĉiutempe mi sendas;
Dum tag' kaj dum nokto trankvila
Ĝi flugas al Vi en ĉielon.

Johanino.

Estas jen Jesuo.
Li iras el la urb' en Betanion.
Lazar', amiko Lia, tie loĝas
Kun du fratinoj. En ilia hejmo
Al Li rifuĝo ĉiam estas preta.
Mario ankaŭ, al la fest' veninta,
Ĉe ili gastas nun, kaj Ŝi atendas
Alvenon de amata sia Filo.
Ho, estas Li; mi nun rekonas vortojn
De psalmo de Davido en la bela
Kantado de dekdu disciploj Liaj.

Prokulo (al la sklavoj).

Rapidu, sklavoj! — Ho, se unu fojon
Ankoraŭ mi Lin povus ekrigardi!

(Prokulon kaj Johaninon oni forportas
La scenejo iom da tempo estas malplena)

Ho, Dio, al preĝo humila
Returnu Vi Vian orelon!
Malbono por mi estis beno,
En koro mi sentas suferon,
Al mi proksimiĝas geheno,
Kaj timas mi Vian koleron.

SCENO DEK DUA.

(De maldekstre eliras Bartimeo. La kantado el la urbo estas pli laŭta).

Bartimeo.

Ho, fine! Mi denove Vin ekvidos!
De la ciel' sur teron falis nokto,
Okulojn miajn per mallum' kovrante,
Sed Vi, Sinjor', senĉesa estas lumo!
Ne nur okuloj miaj estis blindaj,
Sed estis blinda ankaŭ la animo.
[Sopiris ĝi, suferis en mallumo,
Forgesis mi la veron kaj la bonon,
Kaj nur neklara ia rememoro
Pri la purec' infana virta, kvazaŭ
Pri lum', estingiĝinta malproksime,
Vegetis sur la fundo de l' animo].
Kaj jen, al mi Vi faris mirindaĵon,
Kaj tuj post Vi volonte mi ekiris.

Mi kuŝas sur fund' de l' infero,
Min ombro de l' morto sufokas,
Kaj pro mallumega sufero
Mi Vin per la preĝo alvokas.
Vi scias — mi multe sopiras:
Okuloj blindiĝas pro ploro,

Ekaŭdis mi parolon Vian sanktan,
Kaj min timigis mia mallumego.
Ho, venu do, Mesio, Fil' Davida!
Vi, la okulojn miajn malferminta,
Malfermu nun okulojn de l' spirito
Kaj lumon donu al animo mia!

(Li genufleksas, etendante la manojn al nevidata ankoraŭ Jesuo. La kantado estas aŭdata jam laŭte tuj post la mallarĝa trairejo en la fundo kaj daŭras ankoraŭ post la malleviĝo de la kurteno).

La kurteno malrapide malleviĝas.

Al Vi mi la manojn eltiras
Kaj preĝas al Vi mia koro.
Ho, helpu al la suferanto,
De Vi li konsolon atendas!
Ho, Dio, Sinjoro Savanto,
Al Vi mian preĝon mi sendas!

AKTO DUA.

Ĉe Pilato. Peristilo (galeria kolonaro) de l' palaco de Herodo Granda. Du muroj, kuniĝantaj rektangule en la fundo de l' scenejo. En la dekstra muro du pordoj: la unua, pli proksima al la rigardantoj, kondukanta al la juĝeja podio (pavimo aŭ gobato), estas fermita ĝis la dudeka sceno; la dua pordo — al la internaj ĉambroj de Pilato. En la mezo de l' maldekstra muro — kurtenita tria pordo, kiu kondukas al eliro el la palaco. Inter la pordoj de l' dekstra muro — niĉo kun marmora statuo. Retirite de la muroj kaj paralele al ili — kolonaro el kelkaj kolonoj, sur kiuj estas fiksita transkovrilo, formanta tegmenton super trairejo inter la muroj kaj kolonoj; la planko de tiu ĉi trairejo estas pli alta, ol la nivelo de l' scenejo je kvar marmoraj ŝtupoj, kiuj kondukas al ĉiu el la tri pordoj. La trairejo maldekstre kondukas al Prokulo, kaj dekstre — en aliajn ĉambrojn. En la mezo de l' marmora mozaika planko-fontano. La truo en la plafono estas kurtenumita per malpeza ŝtofo, tra kiun de supre penetras la lumo. Riĉa meblaro: kuŝejoj, tabloj, apogseĝoj, benkoj, marmoraĵoj, bronzaĵoj, vazoj kun floroj, fumingo, lumingo, tapiŝoj, multekostaj ŝtofoj. Antaŭmateniĝa krepusko.

SCENO UNUA.

(Lio, sola, sidas sur la marmora benko kaj viŝas arĝentan kruĉon. Enkuras Aleksandro, tre ekscitita).

Aleksandro.

Ho, Lio! Lumo de okuloj miaj!

Lio (timeme ĉirkaŭrigardante).

Silentu, Aleksandro! Singardeme!

Aleksandro.

Neniu estas! Mi kara Lio!

Mi pro ekscit' ne dormis tutan nokton...

Pri nia am' ankoraŭ nun mi tremas...

Al ĝi minacas io tre malbona!

Lio.

Ho, mia Aleksandro! Kiel timas

Mi vortojn viajn! Kio do okazis?

Aleksandro.

Hieraŭ, tuj post mia amkonfeso,

Post kiam en arbaro Getsemana

Nin ektimigis voĉoj, vi promesis

Al mi revidon en alia loko.

Mi vidis, ke vi tien ekrapidis.

Post vi mi malproksime iris, por ke

Nin oni ne ekvidu kune. Tiam

Subite min popolamaso baris.

Servistoj estis tio de l' ĉefpastro;

Rekonis ilin mi dank al la lumo

De l' torĉoj. Mi ne povis vidi, kiun

Kondukis ili; sed mi bone vidis
 La romajn militistojn. Sur la kaskoj
 Kaj sur kirasoj lunradioj brilis
 Kaj flamo de la torĉoj. Tiuj homoj
 Jen kun bastonoj, jen kun glavoj iris...
 Ho, Lio, kial do vi ne plenumis
 Promeson vian — kelkajn nur momentojn
 En Josafata val' al mi donaci?
 Kaj kial ĉe la pont' sur font' Kedrona
 Sub la cipreso ĉe la sarkofago
 Vi ne atendis min?

Lio.

Mi vin atendis,
 Sed bruon de popolamas' mi aŭdis:
 Pro tio mi ektimis kaj forkuris.
 Ho, kial oni nin malhelpis! Kial
 Vi min ne kuratingis, Aleksandro!

Aleksandro.

Ne bruu, kara Lio! Ĉiuj dormas!

Lio.

Mi ne forgesos hieraŭan nokton!
 Lunlumo, ombro de la olivujoj,
 De fontoj murmurado kaj delonge
 Jam atendata via amkonfeso,

Ĉi ĉio ŝajnas nun belega sonĝo!

(El la tria pordo aperas nerimarkate de
 ili Johanino).

Ne estas tamen plena la feliĉo;
 Ho, se ni povus al la Majstro nia
 Pri ĉio diri! Estas Li favora
 Kaj tiel bona, milda kaj afabla!
 Ho, se pri ni Li preĝu kaj geedzan
 Kunligon nian bonfavore benu!

Aleksandro.

Sed, mia kara Lio, vi forgesis:
 Por sklavoj ne ekzistas geedziĝo.
 En la sklavec' vi sola min konsolas!
 Ĝis hieraŭa nokto ni ja preskaŭ
 Eĉ ne interparolis. Per rigardo
 Mi nur sekvadis ĉiun vian paŝon.
 Ho, kiel dankas mi ĉi tiun nokton,
 Kaj la aromon dolĉan de l' printempo,
 Kaj nian renkontiĝon en arbaro!
 Nevole mi eldiris amkonfeson...
 Vi ne forpuŝis min de vi, ho, palmo
 Jeriha, ĉarma rozo Engadia!

Lio.

Ho, mia kara, mia ĉarma! Rozo
 Sarena! Cedr' gracia de Libano!

SCENO DUA.

Johanino (neaŭdate alproksimiĝinte,
post iliaj dorsoj).

Salutas vin, amikoj!

(Ili en timo eskaltas. Komenciĝas mateno).

Al esperoj

Plej lumaj la animojn vi fordonis;

La amo, kiel suno, vin blindigis

Kaj vokas vin en belan malproksimon...

(Ŝi rimarkas la kruĉon kaj observas ĝin).

Ho, kiel eleganta! Ekaperis

En ĝi talento de artisto lerta!

[Gravuri tiel estas nur kapabla

La arĝentist' Efesa Demetrio

Aŭ eminenta Zenodor' Arverna].

Tre bela, kvankam idolista, mito

Ĉi tie estas: jen Amur' flugila,

Junul' enamiĝinta, jen Psikeo —

Anim' senmorta, lia amikino.

Sed dirus mi, ke Aleksandr' kaj Lio.

Amikoj miaj! Mi nevole aŭdis

Konfeson de la amo konfidema.

Mi scias la sekreton delikatan.

Pro tio, ke de vi mi ĝin forŝtelis,

Al vi mi pagos per kunhelpo mia:

Komencos mi klopodi ĉe Prokulo,

Ke vin Pilato liberigu.

Aleksandro.

Dio

Vin rekompencul

Lio.

Sinjinorino kara!

Plej supra Dio benu vin centoble

Pro via bonfavoro!

Johanino.

Mia koro

Sopiras pri samgentaj mizeruloj,

Por kiuj la sklaveco estas sorto.

Kaj ĉiuj filoj Izraelaj ĝemas,

Premataj per la jugo idolista;

Sed ĉiu en la hejm' libera estas,

Kaj vi, amikoj, hejmon eĉ ne havas!

Aleksandro.

Ne vane, certe, sinjinorino kara,

Ĉi tie idolistojn vi vizitas

En tia frua hor'. Ekbrilos baldaŭ

La suno; super la altaro Dia

Jam flugas al ĉiel' en densa nubo

Bonodoranta dolĉa timiano

Kaj sankta fumo de l' ofer' matena.

Per fortaj sonoj de trumpetoj kupraj

Levidoj tuj anoncos grandan tagon,

Dum kiu maco, kaj ŝafido paska,
Kaj herb' amara nin rememorigos
Pri dato de l' forkur' el Egiptujo.
En tiu tago kontraŭ malpurigo
Ni gardas nin. Do kial vi hodiaŭ
Ĉi tien venas?

Johanino.

Ni en Galileo

De longe jam forlasis tiun leĝon.
Ni ĉe Herodo en Tiberiado
En kontenteco kaj en lukso vivas
Kaj sekvas pli volonte romajn morojn,
Ol la ordonon de Moseo. [Nure
Al Paska festo en Jeruzalemon
Kvarpotencul' Herodo alveturas
Saluti Dion de l' izraelidoj].
— Ja min invitis sinjorino via...

(De maldekstre eniras Prokulo).

SCENO TRIA.

Prokulo.

Vi venis jam! Mi estas tre kontenta,
Ke vi rapidis. Malagrabla sonĝo
Turmentis min la tutan longan nokton.
Mi kvazaŭ estis en dezert' sovaĝa
Kaj vagis en krepusko. Malproksime

Briletas lum'. Rigardas mi kaj vidas
Konatan, ĉarman bildon de Jesuo.
Kaj tre mallaŭte, preskaŭ neaŭdeble
De malproksime Lia voko sonas:
— „Vi sekvu Min!“ — Mi kuras tre rapide,
[Sed dornoj kaj ŝtonegoj akraj vundas
Piedojn miajn kaj la vojon baras;
Mi ĉiam kuras, malgraŭ la doloroj].
La bild' pli hela estas, pli proksima,
Kaj tute jam proksima, nur du paŝojn, —
[Mi malfortiĝis, tamen kuratingas...]
Subite — jen abismo; sur la fundo
[Profunde, per rigard' nemezureble,
En mallumego bolas, bruas, siblas]
La akvoturno de la font' ribela.
Kaj de alia bord', el malproksime
La luma bildo ree vokas, logas.
Tra bruo de la font' mi ree aŭdas:
— „Vi sekvu Min!“ Laŭ rando de l' abismo
Kuradas mi, simile al freneza.
Jen mi min ĵetis... Flugas mi rapide
Kaj... kaj vekiĝas...

Lio.

Profetanta sonĝo!

Prokulo.

Trifoje mi ĝin sonĝis dum la nokto.

(El la tria pordo eniras Jozefo, tre ekscitita).

SCENO KVARA.

Jozefo (al Prokulo).

Laŭ via volo mi al vi rapidas
 Sciigi: en ĝardeno Getsimana
 Ĉi nokte oni kaptis jam Jesuon.

Prokulo.

Do, mia antaŭsento min ne trompis!

Johanino.

Ho, se nur povus mi al vi ne kredi!
 — Ho, kara nia Majstro!

Lio.

Ĉu neniu
 El ni Lin povas tie ĉi defendi?

Aleksandro.

Ho, se mi havus forton de Samsono!
 Mi nun komprenas, kiun akompanis
 Popolamas', barinta mian vojon!

Lio.

Kaj mi komprenas nun, de kiaj homoj
 Ĉi nokte mi forkuris timigita.

(La suno leviĝis. Post la scenejo de mal-
 proksime estas aŭdataj venantaj de la
 templo trumpetaj sonoj de levidoj.)

Jozefo.

Kuraĝu! Jen trumpetas jam levidoj.
 Al la Kreint' senmorta en ĉielo
 Ni preĝu dum la horo de l' tagiĝo.
 Ni estas ja senfortaj kaj mizeraj.
 Li nin atentos en la tag' malĝoja,
 Defendos nin kaj sendos sian helpon.

(Johanino kaj Lio genufleksas.)

Jozefo.

Dio, la Patro ĉiela,
 Multajn miraklojn faranta,
 Donis al tero malhela
 Lumon de l' suno brilanta.
 Dio, ne nur la okulojn
 Per sunradioj ĝojigu,
 Ankaŭ la korajn nebulojn
 Per Via suno lumigu!

Johanino.

Faru min forta, kredema,
Ke per la tuta mi koro
Estu al vi obeema,
Mia potenca Sinjoro.
Donu al mi en mizero
Fortojn, ho Patro ĉiela, —
Ke eĉ dum temp' de sufero
Restu al Vi mi fidela!

Lio.

Al la okuloj donanta
Lumon de l' suno necesan,
Donu al mi, Vin preĝanta,
Amon senliman, senĉesan!
Sunon al homoj sendanta
Post la malbona vetero,
Faru, ke por la amanto
Estu feliĉo mi vera.

Aleksandro (genufleksante).

Per la radioj purpuraj
Noktan pelanta fantomon,
Faru, ke per koroj puraj
Kantu ni nun Vian nomon.
Nia laboro fervora,
Ĉiam farata el koro,

Per Via sun' bonfavora
Estu benata, sinjoro!

(Ili leviĝas.)

Prokulo.

Ĉu la matena aero,
Ĉu tiel suno agitas,
Ĉu de la preĝo mistero
Min tiel forte ekscitas?
Plena de sento la koro...
Plor' malsekigas okulojn...
— Ĉu do en tiu ĉi horo
Dio atentas piulojn?

Jozefo (al Prokulo).

Okazis teruraĵo: oni juĝis
Jesun nokte en la sinedrio,
Kaj oni Lin kondamnis al la morto.

Prokulo.

Ne vana estis mia song' terura!

Jozefo.

Hodiaŭ frue sinedrio ree
Kunveni volas. Nia leĝ' postulas,
Ke mortverdikto estu post tagnokto
Denove diskutata. Sed juĝantoj
Atendi ne intencas; ili volas
Aspiri ekzekuton de Jesuo

Ankoraŭ antaŭ festo. Mi ne dubas,
Ke la verdikto restos ne ŝanĝita.

Prokulo.

Nu, ni disputos kun la sinedrio!
La granda Romo kontraŭ senkulpeco
Neniam mortverdiktojn konfirmadas. —
Sed tamen sentas timon mi en koro...

(El la dua pordo eniras Pilato).

SCENO KVINA.

Pilato.

Mi vidas, malpuriĝo ne timigas
Vin en la domo idolista! Antaŭ
La Pasko mi ĉi tie vin renkontas.

Jozefo.

Mi diordonon unu devas rompi,
Por ke pli altan duan mi plenumu.
La Eternul' al ni ordonas ami
La proksimulon nian same, kiel
Nin mem. Kaj tiu amo min kondukas.
La sinjorinon mi averti venis,
Ke, blindigita per envi' kolera,

La sinedrio al la ekzekuto
Kondamnis Senkulpulon, kaj hodiaŭ
Al via juĝo oni Lin prezentos.

Pilato.

Li kiu estas?

Jozefo.

Certe vi jam aŭdis

Pri Li: Jesuo estas Li nomata.

Prokulo.

Pontio, vi sendube ne konfirmos
Verdikton tiun. Ĉu la leĝo povas
Senkulpan puni!

(El la dua pordo eniras la centestro.)

SCENO SESA.

Centestro.

Ĵus el Cezareo
Alvenis la prefekto de kohorto.
Du tribunuloj de legio kune
Alvenis ankaŭ. Ili de ne longe
Al ni el Romo estas alsenditaj.
Ĉi tiuj tri deziras sin prezenti.

Jozefo (al Johanino).

La devon mi plenumis, Johanino.
Ĉi tie ni nenion plu jam faros.

Johanino.

Kaj mi bezonas iri al la edzo
Palacon Makabean. Superfluaĵ
Ni estas nun. Adiaŭ!

Prokulo.

Ĝis revido!

(Jozefo kaj Johanino foriras tra la tria
pordo. Aleksandro kaj Lio post ili. Pro-
kulo foriras maldekstren al siaj ĉambroj.)

SCENO SEPA.

Pilato.

Invitu tribunulojn kaj prefekton.
— Centestro, mia kunhelpant' fidela,
Ne ŝatas mi ĉi tiujn fierulojn,
Ĉi tiujn senatorojn arogantajn,
Nobelajn, dorlotitajn de la sorto!
Feliĉon ili havas sen klopodoj.
Kun ili ne konkuros ni, rajdistoj,
La dua klaso, kiu per laboro

Atingis la titolojn kaj oficojn!
Vi scias, kamarad' — kunbatalanto,
Ke estas malfacila nia vojo!
Kaj vi memoras tiun tempon, kiam
Aliĝis ni en Rom' dum juna aĝo
Al vic' brilanta de pretorianoj.

Centestro.

Ilia estro, tempa favorato
Sejan', amiko reĝa vin rimarkis ...

Pilato.

Li, same kiel mi, rajdisto estas.
Favoro lia multe min utilis.

Centestro.

[Li faris vin la tribunulo ...]

Pilato.

Poste

Mi en Antiokio, la ĉefurbo
Siria, estis dank' al li prefekto ...]

Centestro.

Li vin rimarkis, vere; vi tre ofte
Sejanon vidi havis la okazojn.

Sed min Fortuno ĉiam malfavoris ...
Kaj certe ĉiam restos mi centestro!

(Post la kulisoj dekstre, komence malproksime kaj mallaŭte, kaj ĉiam pli laŭte aŭdiĝas la bruo de proksimiĝanta popolamaso).

Pilato.

Ne malkuraĝu, kamarado! Ankaŭ
Pri vi mi memorigos al Sejano;
Atendu nur, kaj certe vi sukcesos (Eniras Prokulo).

SCENO OKA.

Prokulo (timeme).

Pro kio oni bruas?

Pilato (al Centestro).

Eksciĝul!

(Centestro foriras tra la dua pordo kaj enirigas prefekton kaj 2 tribunulojn.)

SCENO NAŬA.

Pilato.

Bonvenu, estimataj militistoj!
De kiam estas vi el Romo?

Prefekto.

Ŝipo

Aleksandria antaŭ du semajnoj
Venigis nin el Puteol' Egipton.
Neptuno tien kaj de tie estis
Al ni favora: kvazaŭ tuk' lazura
Trankvile glata estis larĝa maro,
Brilanta per radioj de l' printempo.
Postparton de la ŝip' Eolo blovis;
Post dudek fine tagoj de naĝado ...

(La Centestro revenas.)

SCENO DEKA.

Centestro.

La pontifikoj kaj la ĉefoj ĉiuj
Kun Sinedrio tuta ĵus kunvenis
Sur placo antaŭ pretorio. Ili
Kun si Jesuon ian alkondukis
Por via juĝo. Tien ĉi eniri
Ne volas ili: domo idolista
Minacas ilin per la malpurigo.
Do ili vin al si invitas.

Pilato.

Povas

Mi ankaŭ malpuriĝi de la spiro
De la hebreaĵ buŝoj!

Prokulo.

Koro tremas,

Anim' doloras! Multe min timigas
Venonta juĝo pri Jesuo. — Estu,
Pontio, vi fortika, mi vin petas.

Pilato.

Ĉu efektive iu povas dubi
Pri mia fortiĝec'? Mi ne komprenas,
Pri kio tiel vi maltrankviliĝas!
Hebreo nun atendas mian juĝon:
Se estas Li senkulpa, liberigos
Mi Lin; sed se Li estas mortiginda,
Mi Lin ordonos ekzekuti. Unu
Malestiminda judo malaperos ...

(Al la prefekto kaj tribunuloj.)

Jen mia viv' en malbenita lando!
Ĉi tie ĉiutage — tedoj, zorgoj:
Pri la ripoz' mi pensi eĉ ne povas.
La devo vokas min. — Mi rekomendas
Al vi paroli kun edzino mia.

(Li foriras tra la dua pordo dekstre
La Centestro sekvas lin.)

SCENO DEK UNUA.

Prefekto.

La diojn devas danki viaj gastoj,
Ke malsukceson havis maljunulo
Sever' Cecino: estis proponinta
Li al senato, ke al prokuristoj
Per leĝo mem malpermesate estu
Kunpreni la edzinojn. Se senato
Akceptus tian leĝon, nie ne ĝuus
Nuntempe vian ĉarman gastamecon.

(Bruo de l' popolamaso post la kulisoj
dekstre.)

Prokulo (distre, aŭskultante la bruon).

Jes, efektive. Povas esti ... Certe ...

2-a tribunulo.

Se la edzinoj de la prokuristoj
Similaj estus al mastrino nia,
Prokulo bela, tiam la senaton
Sever' maltrankviligi ne bezonus.

Prefekto.

Severo certe celis la edzinon
De la vicreg' Pizono en Sirio.

1-a.

Pizono kaj Plancino! Ĉu ne ambaŭ
 Venenis ili antaŭ dek tri jaroj
 La filon Tiberian — Germanikon,
 La heredanton de la reĝa trono?

Prefekto.

Jes, certe ili. Ĉie tiutempe
 Pri ili estis tre malbona famo.

1-a.

Plancino estis tre fieraj; ankaŭ
 Ŝi en regadaferojn enmiksigis;
 Ŝi ŝatis ekzercadojn militistajn.
 Ŝin ofte oni vidis ĉirkaŭitan
 De aro de la militistoj; ili
 Ne ĝenis sin kun ŝi. Ŝi amindumis
 Kun la centestroj.

(Ree aŭdiĝas voĉoj post la kulisoj dekstre).

Prokulo (kun ŝajna gajeco).

Kiel amuzige!

2-a.

Matronoj ofte ŝatas rompi limojn,
 Al ili de l' naturo destinitaj ...

1-a.

El ili kelkaj, per armaj' kovritaj,
 En cirko luktas kun gladiatoroj ...

(La voĉoj silentiĝas.)

2-a.

Aliaj tutajn noktojn en festenoj
 Pasigas, pro la veto kun la viroj
 Pri tio, kiu pli abunde drinkos.

1-a.

Mi konas ankaŭ tiajn, kiuj estas
 Tre spertaj en procesoj kaj memstare
 Prezentas plendojn al juĝejo.

2-a.

Ankaŭ

Ekzistas multaj versamatorinoj,
 Skribantaj versojn en tre granda kvanto.

Prefekto.

Sed pri kvalito mi jam ne parolu.

1-a.

Mizero estas veni kiel gasto
 Al tiuj versamatorinoj: ili

Senĉese, kvazaŭ vete, babiladas
Pri tio, ĉu Homer' aŭ Virgilio
Pli alta estas.

2-a.

[Jes. Sed plej malbone,
Se iafoje pri filozofio
Matrono ekparolos.

1-a.

Mi kun tia
Konata estis. Dronis ŝi en lukso,
Sed la rulaĵojn de la stoikuloj
Ŝi ĉiam havis sub kusenoj silkaj.

2-a.

Mi unu konis tre malbelan, ankaŭ
Ŝi estis jam maljuna, tamen ŝatis,
Ke dum tagmanĝo aŭ vestiĝo oni
Al ŝi Platonan „Respublikon“ legu ...
Pri moraleco kaj pri abstinenco
Aŭskultas ŝi; sed jen sklavino donas
Al ŝi amletereton, kiun skribas
Junulo iu, malgajninta tutan
Havaĵon sian, kaj enamiĝinta
Ne tiom la matronajn ĉarmojn, kiom

Riĉaĵojn ŝiajn. La legisto haltas.
Rapide tuj ŝi skribas la respondon,
Kaj ree, rigardante en spegulon,
Matrono respektinda tre atente
Aŭskultas „Respublikon“ de Platono].

1-a.

Mi ankaŭ konis unu scienceman
Maljunulinon; havis ŝi dungitan
Malriĉan stoikulon. En vilaon
Ŝi estis transmigranta en Ostio,
Kaj en la lasta veturilo, kune
Kun kuiristo, kaj frizisto, sekvis
Ŝin stoikulo ŝia sub pluvego.
Al li maljunulino komisiis
Hundeton ŝian plej amatan porti.
Kaj jen en togo lia dum la vojo
Hundeto bone naskis la hundidojn!

Prokulo.

Mizeran bildon de l' virino roma
Vi pentris! Ĉu ŝi efektive havas
Malaltajn nur, hontindajn kaj ridindajn
Mor-traĵojn? Ja en ŝi ne estingiĝis
Por ĉiam virt', kuraĝo kaj ĉasteco?

(Ree la bruo de l' popolamaso.)

Prefekto.

En nia tempo de senmoraleco,
De avideco pri profitoj monaj,
En tempo, kiam ni flateme fleksas
La dorson antaŭ fort', kaj saman dorson
Al mizeruloj, al malfortaj turnas,
Kaj kiam ni la taskon kaj la celon
De l' vivo nur en monprofito vidas, —
Ĉu povas trovi ni la virton?

(La bruoj post la kulisoj plilaŭtiĝas. Estas
aŭdate, ke la popolamaso foriras. La voĉoj
iom post iom malproksimiĝas kaj silentiĝas.)

Prokulo (afekte, distre).

Certe (Flanken).

Popol' foriras... (al la Prefekto). Povas esti...

Prefekto.

Pasis

Kaj ne revenos tiu glora tempo,
En kiu ĉastaj estis la virinoj
Kaj kiam en iliaj noblaj koroj
Profunde kaŝis sin diversaj virtoj.
Jarcento nia estas difektita,
Malgrandaj homoj, kaj la mond' pereas.

(Eniras Pilato kaj la centestro.)

SCENO DEK DUA.

Pilato.

Ho, pli facile estas tutan tagon
Rebati la germanojn, ol disputi
Dum duonhoron kun popolo hebrea.

Prokulo.

Rakontu do detale ĉion, kio
Okazis tie. Pro senpacienco
Mi brulas.

Pilato.

Jen al ili mi eliras.

Mi vidas, antaŭ la podio alta,
Malsupre sur la plac' popolo bruas;
Ĉefpastro, la skribistoj kaj la membroj
De l' sinedrion antaŭstaras. Venas
Al mi laŭ la ŝtuparo la gardistoj
Kun la Malliberulo. Kaj aperis
Li nudpieda antaŭ mi, vestita
Mizere. Sed kun tiu ĉi aspekto
Majesta ŝajnis Li kaj kvazaŭ ia
Sub ĉifonaĵo sin kaŝanta reĝo.
Li ne similas judon; similecon
En Li mi trovis al neniaj homoj.
Trankvile kaj senmove, kun indeco,

Sen timo, sen tumulto, rekte
Kaj enpenŝiĝe Li okulojn miajn
Rigardis. Kaj rigard' severa tiu
Min kvazaŭ persekutas. Mi ne povas
Ĝis nun de ĝi min tute liberigi.

Prokulo.

Neforgeseblaj estas la okuloj!

Prefekto.

Mi Lin ne vidis, sed ĉi kion aŭdis
Mi pri ĉi tiu homo, estas tia,
Ke baldaŭ ŝajne en animo mia
La forperdita kredo reviviĝos
Pri Jupitero, Febo kaj Hermeso,
Veninta sur la teron sub modesta
Aspekto de hebreo-almozulo!

Pilato.

Pli arogante bruis la popolo,
De ĉiuj flankoj pli kolere kriis,
Kaj ĉiam kreskis la popolamaso.
[Mi aŭdis krion: Li sin nomas Kristo
Kaj Reĝo! Li malmoraligas nian
Popolon per predikoj siaj! Pagi
Impostojn al la Reĝo ne permesas!].

Prokulo.

Kalumniistoj kaj hipokrituloj!

Al Li skribistoj — la semajn' ne pasis —
Proponis ruze la demandon tiun:
— „Ĉu pagi la impostojn al la Reĝo? —
Per la respondo Li hontigis ilin, —
Li diris: — „Donu vi al Dio Dian,
Kaj al la Reĝo — reĝan“. Tion diris
Al mi Jozefo]. Kio estis poste?

Pilato.

Kaj kio poste?.. Ĉu, al vi simile,
Aŭ kiel Johanino aŭ Jozefo,
Mi memorfiksis ĉiun vorton Lian?
Pri Li mi nun ne povas pensi: zorgojn
Pli gravajn havas mi. — Jen li rakontu.

Centestro.

Vi foriris

En pretorion. Laŭ ordono via
Jesuon solan mi, sen gardistaro,
Al vi venigis. Kaj vi Lin demandis,
Ĉu estas Li Judea Reĝ'? Anstataŭ
Respond', demandis ankaŭ Li: ĉu diras
Ĉi tion vi de vi, aŭ ĉu aliaj
Pri tio diris? [— „Ĉu mi judo estas!“ —
Respondis vi: — „Al mi Vin alkondukis
La pontifikoj kun popolo Via“. —
Kaj Li rediris...]

Pilato.

Jes, mi rememoras.
Rediris Li, ke regno Lia estas
Ne tera. Do, por Rom' kaj por la reĝo
Ne estas Li danĝertimiga.

Prokulo.

Pluen!

Pilato.

Se de la tero estus Lia regno,
Por Li servantoj Liaj tiam agus,
Por ke Li nun ne estu arestita
De judoj.

Prefekto.

Kiel ruza tamen estas
Ĉi tiu disimila predikanto!

Pilato.

Li diris, ke pro tio Li naskiĝis
Kaj en la mondon venis, por... por...

Centestro.

Por doni la ateston...

Pilato.

Jes, por doni
Ateston ian pri... pri ia vero.
Sagacan sencon de ĉi tiuj vortoj
Mi ne komprenas.

Prokulo (al Centestro).

Ĉu vi ne memoras,
Centestro, kion plie Li parolis?

Centestro.

Ke ĉiu, kiu estas de la vero,
Ekaŭdos Lin.

Prokulo.

La vero! Ho, mi kredas,
Li montros ĝin, al ĉiuj ĝin klarigos
Kaj nian pekan mondon renovigos!

Prefekto.

Sensencaj, laŭtaj vortoj! Mi ne kredas
Al tiuj ĉi revantoj. Ili multaj
Dum nia tempo en la mond' aperis;
Arbitre ĉiuj ili klarigadas
La vivon, morton kaj la mondkreadon,
Kaj la postmortan staton de l' animo.
Neniu tamen per radi' de scio.

Penetros la mallumon nin kaptintan.
De la doktrinoj tiuj ni nur havas
Sensignifecon, polvon kaj la cindron.

Pilato.

Jes! Kio estas vero? — Al popolo
Eliris mi kaj diris, ke ne vidas
Mi kulpon en juĝato. Tamen ili
Persistis, ke popolon Li ekscitas,
Ĉar Li instruas de Jeruzalemo
Ĝis Galileo. Nun mi ekmemoris,
Ke estas Li galileano. Tiam
En mian kapon venis bona penso
Direkti Lin al la kvarpotenculo.
Ni malpaciĝis kun Herodo; sekve
Preteksto estas por paciĝi.

Centestro (al Prokulo).

Ili

Jesuon en amaso al Herodo
Ekpelis

Pilato.

Estas mi kontenta,
Ke trovis mi rimedon liberigi
De l' enuiga dev' — Jesuon juĝi.
En viajn ĉambrojn vi, Prokulo, devas

Foriri: al matrono ne konvenas
Ĉeesti la aferan konsiliĝon.

(Foriras: Prokulo — maldekstren kaj
Centestro — tra la dua pordo.)

SCENO DEK TRIA.

Pilato.

Mi vin ne povas, militistoj miaj,
Gratuli je la vivo en Judeo.
Popol' ĉi tie estas kruda, ema
Ribeli, brui, malpaciĝi, venĝi.

Prefekto.

Ĉu ne en ĉiu lando la popolo
La bonajn kaj malbonajn ecojn havas?
El la unuaj oni devas preni
Utilon, la ceterajn scii venki.

Pilato.

Dum dudek jaroj antaŭ mia veno
Kvar prokuristoj havis tempon troe
Dorloti la popolon. Ĝi libere
Diservojn faras en preĝejoj siaj;
La judojn oni al milit' ne varbas.
Pro malestim' ilia al skulptado
De ĉio, kio spiras, kio vivas,

Ĉi tie pro senlima malforteco
Eĉ ne sukcesis Rom' Jeruzalemon
Ornami per statuoj de la reĝoj.

1-a tribunulo.

Mi, efektive tie ĉi ne vidis
Statuojn de Julio aŭ Aŭgusto,
Nek eĉ de nia Tiberio Dia,
Potenca reĝ' — lin gardu Jupitero.

Prefekto.

La potenculo granda, subigante
Popolojn fremdajn, pro la toleremo,
Ĉis nun nenie eĉ tuŝetis iom
Ilian religion aŭ la morojn.

Pilato.

Veninte tien ĉi, ne ektoleris
Mi tiun malhonoron kaj, preninte
La direktilon per potenca mano,
Ordonis mi el Cezareo nokte
Al Antonia tur' Jeruzalemon
Transporti la standardojn de l' kohortoj —
Insignojn niajn kun la bildoj sanktaj
De l' dia reĝo.

Prefekto.

Estas tre dangera
Kaj tre kuraĝa paŝo! Mi permesas
Al mi gratuli vin je tia ago
Bravega kaj sentima.

Pilato.

Kiam judoj
Ekvidis dum tagiĝo la insignojn
De la kohortoj sur la mur' de l' turo,
[Staranta alte sur la placo larĝa,
En kiu nia oferflam' fumiĝas,
En granda amasego Cezareon
Kun ĝemoj kaj kun ploro ili iris.
Kvin tagojn kaj kvin noktojn tre obstine
Sieĝis ili min en la palaco.
Ordonis mi en cirkon ilin peli.
Iliaj plendoj pli kaj pli aŭdiĝis.
Sed kiam laŭ ordono mia ilin
Ĉirkaŭis militistoj kun la glavoj,
Falinte sur la teron kaj ĝemante,
Popolamaso kriis, ke plivolas
Ĉi morti, ol toleri malhonoron
De l' religio.

Prefekto.

Sed decidon vian
Sendube vi ne ŝanĝis?

Pilato (iom konfuzite).

Mi ne volis
Sangverŝon . . . La Insignojn de l'kohortoj
Ordonis mi reporti Cezareon.
Kaj jen de tiu tempo mi malamas
Hebreojn.

2-a tribunulo.

Ne tre amas ilin ankaŭ
La Romo. Kiel mi memoras, antaŭ
Dek jaroj ŝajne, estis ekzilitaj
Kvar miloj proksimume da hebreoj
El Romo.

Pilato.

Tiberio disimila
Ĝin faris laŭ konsilo de Sejano,
Ne toleranta tute la hebreojn.
Sejano, la reganto saĝa, sperta,
Ordonis, min sendante en Judeon,
Ke kiel eble estu mi severa
Kun la popolo ĉi-tiea. Tial
Mi ankaŭ nun pendigis orajn ŝildojn,
Sur kiuj estas arte gravurita
La nomo de potenca Tiberio,
Ĉi tie antaŭ la palaco.

Prefekto.

Vidis

Mi ilin, enirinte; estas ornamita
Per ili apogseĝo via juĝa.

Pilato.

Nu, kio nova? Sana estas reĝo?

Prefekto.

Li maljuniĝas.

1-a tribunulo.

Okdek jarojn havas.

2-a.

Li ĉiam pro likenoj suferadas,
Sur la vizaĝo ĉiam restas plastroj.

1-a.

En Romo oni longe lin ne vidas.

2-a.

Sur la insulo la ermit' kronita
Malgaje finas sian longan vivon.

1-a.

En arbaretoj kaj ĝardenoj liaj
Ne multaj havas rajton lin viziti.

2-a.

En ombro de portikoj kaj kolonoj
El la floretoj sur rokplenaj bordoj
Admiras li belecon de Vezuvo
Kaj la vastaĵon bluan de la maro.

Prefekto.

Ĝibiĝis li. Post morto de Sejano...

Pilato.

Post morto de Sejano?!..

Prefekto.

Ĉu ankoraŭ

Ĉi tien ne alvenis la sciigo
Pri lia mort' terura?

1-a tribunulo.

Tiberio

Per la letero al senat' kulpigis
Lin en perfido regna.

Prefekto.

Do, Sejano

Juĝita estis.

1-a tribunulo.

Kaj ekzekutita.

2a.

Statuon lian antaŭ la Pompea
Teatr' popolamaso tuj faligis
Kaj rompis.

1-a.

La kadavron de Sejano
Taŭzitan, laŭ la stratoj dum tri tagoj
Popolamaso trenis.

Pilato.

Grandaj dioj!

Sejan' pereis! Mia favorinto!
Terure! Kiu min de nun protektos,
Defendos, kiu estos mia forta
Apogo!..

(El la dua pordo eliras Aleksandro.)

SCENO DEK KVARA.

Aleksandro.

La legato de la reĝo
Eli' Lamio de Kapreo sendis
La kurieron. Jen, sinjor', letero.

(Li enmanigas al Pilato kovritan per
vakso tabuleton, sur kiu estas akribita
la letero.)

Prefekto (al la tribunuloj).

Ni iru nun, amikoj. De Lamio
Letero certe havas ion gravan.
Do, ne malhelpu ni prokuratoron.

(Ĉiuj, krom Pilato, foriras tra la dua
pordo.)

SCENO DEK KVINA.

Pilato (legas la leteron).

„Pasis la tempo, kiam laŭ la instigoj de Sejano judoj
ne estis favorataj de la reĝo. Nun al ili estas redonita
la bonfavoro de nia potenculo. Sur la insulo Kapreo
estas ricevita plendo de la Jeruzalemaj civitanoj, ke la
prokuristo de Judeo, malestimante iliajn religion kaj leĝojn,

elpendigis antaŭ la palaco la dediĉitajn al la reĝo
orajn ŝildojn. La majestulo ordonis anonci al vi lian
koleron kaj postulas, ke la ŝildoj estu realportitaj en
Cezareon kaj lokitaj en la templon de Aŭgusto“ ...

(Li dispecetigas la tabuleton.)

Se mia defendant' Sejano vivus,
Lamio, malamik' malnova mia,
Al mi laŭ la ordono Tiberia
Ne skribus tion. — Venis fulmotondro:
Neatendite, kvazaŭ fulm' ekbrilis
Sciigo pri la morto de Sejano;
Kaj nun kolero de la potenculo
Min frapas, kiel bato tondra.
Mi kie kaŝos min kaj kie savos!
Kaj ĉu ekzistas en la mondo loko
Sekreta, malproksima, nesciata,
En kiu el Kapreo izolita
Minaca, kurbiĝinta maljunulo
Per la kaduka, sed potenca mano
Ne povus kapti min kaj pereigi?
Ho, ne, ne povas mi de li min kaŝi,
Simile kiel de la fulmotondro.
Kaj do pli certe, pli trankvile estos
Transdoni min al la potenca monstro.
Ke estu ...

(Dekstre post la kulisoj estas aŭdata
bruo de l' proksimiĝanta popolamaso).

— Voĉojn mi kaj bruon aŭdas ...
Amaso da hebreoj de Herodo

Jesuo rekondukas ... Kiel ajn do
Decidus nun kvarpotenculo, tamen
Plenumos mi la leĝon. Li sendube
Ne estas kulpa. Mi Lin liberigos
Kaj donos al la reĝo la ekzemplon
De la justeco, de senpartieco
Kaj de forteco de vicreĝo lia.

(Li foriras tra la dua pordo dekstre.)

SCENO DEK SESA.

(Eniras: Prokulo, Aleksandro kaj Lio de maldekstre, kaj Johanino — el la tria pordo.)

Prokulo (al Johanino).

Ho, fine! Mi vin tiel atentadis!
— Vi aŭdas, Johanino, sur la placo
Denove la popolamaso bruas.
Vi certe estis tie, ĉe Herodo?

Johanino.

Mi estis efektive.

(La bruo post la kulisoj silentiĝas.)

Prokulo.

Ho, rakontu,

Okazis kio?

Johanino.

La kvarpotenculo
Jesuo ĉiam revis vidi ...

Prokulo.

Poste

Pri tio vi rakontos. Ne turmentu!
Rakontu, kion faris li, Herodo?

Johanino.

Jesuo li ordonis al Pilato
Konduki reen.

Prokulo.

Sekve de Pilato

Dependas ree Lia viv' kaj morto?

Johanino.

Sendube jes, Prokulo. Via edzo
Decidon devas fari.

Prokulo.

Mi ne povas,

De dubo kaj nescio turmentata,
Atendi finon de ĉi tiu juĝo! —
Rapide kuru, Aleksandr' al edzo ...

Eksciu bone ... Ne, atendu! ... Diru
Al li, ke mia sonĝo ... Vi ja scias ...

Aleksandro.

Mi estas preta, sinjorino ...

Prokulo.

Diru

Al la sinjoro, ke ... ĉu vi komprenas? ...
Ke li ne malutilu nun al Tiu ...
Al Tiu ĉi Justulo ... Grandaj dioj!
Mi tremas ... Diru, ke mi multe, multe
Hodiaŭ nokte sonĝe suferadis
Pro Li ... Rapide kuru, Aleksandro!

Aleksandro.

Mi kuras, kuras! ...

Prokulo.

Haltu! Ne tro longe

Vi restu tie. Mi ja turmentiĝas,
Nenion eksciinte ... Baldaŭ venu,
Aŭ sendu tien ĉi al mi centestron
Aŭ kiun ajn alian, ke ni sciu
Pri tiu juĝo ...

Aleksandrō.

Ĉion mi plenumos.

(Li foriras tra la dua pordo.)

SCENO DEK SEPA.

Prokulo.

Pardonu, Johanino, ke rakonton
Mi vian interrompis. Sed vi vidas,
Mi tiel ekscitiĝas ... Mi ne trovas
Por mi trankvilon. — Do, Herod', vi diris,
Jesuo jam delonge revis vidi.
Rakontu nun, pri kio en palaco
De Makabeoj aŭdis vi.

Johanino.

Ne timu!

Jesuo ja revenis pravigita;
[Ne dubas mi, ke ankaŭ via edzo
Lin ne kulpigos. — Do, trankvile aŭdu
Rakonton mian. — La kvarpotenculo
En multkolona tronsalonò sidis,
Sin parfuminta kaj vestinta lukse
En la purpuro ora kaj visono.
Ĉirkaŭe apud li el incensuoj
Arom' fumiĝis. Inter la kolonòj
Blankiĝis multaj dioj el marmoro.
Sklavinoj belaj tre gracie svingis
La ventumilojn singardeme super
La kapo de Herodo. Kaj ĉi tien,
En luksan hejmon de la dolĉa sento
Jesuo oni enkondukis

Prokulo.

Pluen!

Johanino.

La pontifikoj unu post alia
Malliberulon Dian kulpigadis:
Pri instruad' malpia, pri blasfemo,
Pri la ribelemeco kaj pri tio,
Ke arogante antaŭ la popolo
Li ĉiam sin nomadas Reĝ' Judea.

Prokulo.

Kaj kion do Herodo?

Johanino.

Li aŭskultis
Ne zorge fariseojn. Li sin montris
Indiferenta al koler' ilia,
Al la siblad' serpenta. Mem komencis
Demandi Li Jesuon; li promesis
Lin liberigi, se miraklon faros
Li antaŭ li. Sed Majstro ne eldiris
Responde al Herod' eĉ vorton].

(Denove forta ekbruo de voĉoj post la kulisoj.)

Voĉo de l' popolo.

Barabon liberigu! Jes, Barabon!

Prokulo.

Pri kio ili krias?

Lio.

Sinjinorino,

Mi aŭdis ...

Johanino.

Kion, Lio?

Prokulo.

Diru, diru!

Lio.

Mi kredas, ke mi ŝajne aŭdis nomon
De ... de Barabo ...

Prokulo.

Kiu do li estas?

(Voĉoj de l' popolo aŭdiĝas ankoraŭ pli laŭte, pli furioze.)

Ho! tiu krio de l' popol' freneza
Simile al tranĉil' orelojn pikas!

Lio.

Barabo estas la rabisto ...

Johanino.

Kiu,
Mi ekmemoras, antaŭ kelka tempo
Ribelon faris en la urb'. Ĉu vere?

Lio.

Kaj faris la mortigon. Nun li estas,
Mi aŭdis, en malliberejo.

Prokulo.

Kio

Do estas tiuj krioj?

(Voĉoj, ĝis nun ĉiam pli laŭtiĝintaj,
komencas silentiĝi.)

Lio.

Mi ne scias.

Prokulo.

[Daŭrigu, Johanino, la rakonton.

Johanino.

Herodo sin amuzis per Jesuo,
Kruele ridis Lin kaj mokofendis.
Kaj korteganoj sprite rafiniĝis,
Diversajn ŝercojn, mokojn elpensante.

Prokulo.

Ho, kiaj malnoblaĵoj!

Johanino.

Lin sufiĉe
Malindiginte kaj mokturmentinte,
Herod' ordonis al la militistoj
Sur la Malliberulon meti brilan
Blankveston, por per tio klare montri,
Ke li en Li ne trovis mortan kulpon.]

SCENO DEK OKA.

(El la dua pordo eniras prefekto.)

Prefekto.

Pardonu min, ho, sinjorino: eble
Ne ĝustatempa estas mia veno.
Sed sentas mi, ke vi sciigojn volas.
Mi kredas, ke ekscitis la kompaton
En via nobla kor' Juĝato tiu.
En Li vi vidas ŝajne Majstron Sanktan;
Ne volas kaŝi mi: ĉi tiun kredon
Ne havas mi en mia koro. Tamen
Kunsentas mi maltrankviliĝon vian
Kaj tutanime mi pri vi kompatas!

Prokulo.

Mi dankas, kara gasto, kore dankas
Bonecon vian. Vi divenis vere
Dezirojn miajn. — Certe, Johanino.

Vi lin ne konas? Estas nia nova
 Prefekt' el Cezareo. — Ho, rakontu
 Pri tio, kion vi persone vidis.

(Ree krio de l' popolamaso post la kulisoj.)

Prefekto.

Sidante sur la juĝa apogseĝo,
 Sur la podio alta, via edzo
 Al judoj tiel diris: — „Vi asertas,
 Ke Homo tiu ĉi malmoraligas
 Popolon vian. Mi aferon tiun
 Esploris. Sed nenian kulpon trovis
 Mi en la agoj de Jesuo, kiujn
 Vi juĝas krimaj. Do, por vin komplezi
 Kaj kontentigi, mi Lin volas puni,
 Kaj post la puno mi Lin liberigos.

Prokulo.

Pri kio vi parolas? „Puni?“ Eble
 Malbone aŭdis mi?

Johanino.

Por kio puni,
 Se tute ne ekzistas ia kulpo?

Prefekto.

Mi nur ripetas tion, kion aŭdis.
 La prokuristo tiel diris.

Prokulo.

Haltu ...

Mi ne komprenas ... Se la Akuzato
 De l' juĝo estas pravigita, kiel
 Lin puni oni povas?

Prefekto.

Sinjinoro,

Mi estas subpotenca: ĉu mi rajtas
 La prokuriston laŭdi aŭ mallaŭdi?

Prokulo.

Forgesu prokuriston; mi deziras
 Ekscii nur: ĉu estas permeseble
 Senkulpan puni?

Prefekto.

Vi memori devas,
 Ke nur por kontentigi la popolon,
 Decidis li Jesuon puni.

Prokulo.

Bone!

La kompromis', komplezo al la forto!
 Ĝi estas malforteco, malnobleco! —
 Rakontu tamen, kio poste estis?

Prefekto.

Kaj jen la prokuristo ekmemoris,
Ke laŭ antikva juda moro, oni
Dum Pasko liberigas arestiton,
Laŭ volo de l' popolo elektitan.
[Kaj tial li al ili jene diris:
— „Ĉu vi deziras, ke mi liberigu
Judean Reĝon?“ — La popolamaso
Deiris. La popolo konsiliĝis
Kun maljunuloj kaj leĝistoj.] Tiam
De vi sendita sklav' subite venis.
Mi aŭdis, kiel li al via edzo
Rakontis pri maltrankviliĝo via
Kaj pri la sonĝo. De l' kompat' premata
Kaj pro la kondolenco, mi deziris
Al vi esperon doni kaj konsolon.
En tiu tempo la popol' Barabon,
Rabiston ian petis liberigi.

Prokulo.

Do, jen pro kio kriis la popolo!

Prefekto.

Pri tio vin sciigi mi rapidis.

(Enkuras tra la dua pordo Aleksandro
kun pala, elturmentita vizaĝo.)

SCENO DEK NAŬA.

Aleksandro.

Ho, kion mi ekvidis!

Prokulo, Johanino, Lio.

Do, rakontu!

Aleksandro.

La voĉon plilaŭtigis la reganto:
Li volis liberigi Instruanton.
— „Krucumu Lin, krucumu!“ — ili kriis.

Prokulo.

Krucmorto!

Johanino.

Ho! krucumi nian Majstron!

Lio.

Ho, kia malĝojego!

Prefekto.

[Sed daŭrigu!

Aleksandro.

Li diris: — „Kian Li malbonon faris?“
Sed des pli laŭte ili ekkriegis;
Kaj tiu krio venkis]. La reganto
Lin donis al kohorto kaj ordonis
Vipadi Lin.

Johanino.

Ho, kia teruraĵo!

Prokulo.

Ho, malĝojego! Ho, eterna honto!

Lio.

Ho, dolor' senfina, plej amata Majstro!
(La virinoj ploras. Ree krioj post la kulisoj.)

Prefekto (flanken).

Nu, bona estas tiu ĉi fortika,
Neŝancelebla, justa la juĝanto.
Sufiĉus la duono da kohorto,
Por diskurigi la popolamason! (Al Aleksandro).
Kaj poste kio?

Aleksandro.

En la Sebastia
Kohorto preskaŭ ĉiuj militistoj

Samariano estas, kiuj judojn
Malamas...

Prokulo.

Pluen!

Johanino.

Nul

Aleksandro.

Okazo estis

Por ili tute bona, per la Reĝo
Judea, kvankam falsa, kontentigi
Malamon sian. En la kort' milita
Malantaŭ la palaco ili ligis
Lin nudan al kolono. Vip' terura
Leviĝis supren, en aer' fajfante.
Kruelaj batoj falis, disŝirante
La korpon...

Prokulo (ŝtopante la orelojn).

Eksilentu!

Johanino.

Ho, sufiĉe!

Lio.

Terure!

Prefekto.

Jes, terura tiu vipol!

Aleksandro.

Dornarbetaĵo kreskas en la korto.
Kaj unu militisto prenis branĉon
Kaj faris kronon. Kun sovaĝa ĝojo
Per ĝi Malliberulon ili kronis.
Eniĝis la pikiloj en la frunton;
[El sub la kron' rubenoj de l' sufero —
Purpuraj helaj gutoj ekaperis].
Alia sur la ŝultrojn liajn metis
Ĥlamidon ian ruĝan, disŝiritan,
Kaj kiel sceptron en la manon donis
Bastonon. Poste ili genufleksis
Kaj forpreninte la bastonon, ili
Al Li la kapon senkompate batis...
Kaj ridegante kaj ŝercante, kraĉis
En la vizaĝon Lian sangkovritan...

Prokulo.

Malboneguloj!

Johanino.

Monstroj!

Prokulo.

Aleksandro,
Vi al Pilato kuru kaj revenu
Rapide kun sciigoj!

Aleksandro.

Tuj mi kuros!

(Li forkuras tra la dua pordo kaj kun-
puŝiĝas kun la eniranta de tie centestro.)

SCENO DUDEKA.

Centestro.

Okazis la vipad'. La prokuristo,
Jesuon ekvidinte, teruriĝis.
Li pensis, ke aspekto Lia sanga
Dolora eble povos tuŝi judojn.
Kun dorna kron', bastono, en ĥlamido
Venigis mi Jesuon Suferulon.
[Pilato diris: — Tio estas Homo!] —
Sed la popol' Lin ekvidinte, ree
Ekkriis tuj: — „Krucumu Lin, krucumu!“ —
La maljunuloj diras, ke ekzistas
Aparta leĝ' laŭ kiu oni devas
Mortigi Lin pro tio, ke Li nomis
Sin Filo Dia.

Prefekto.

Ho, eĉ tiel estas!
 Ne nur „la atestanto de la vero“,
 Ne nur „la Reĝ“ ne de ĉi tiu mondo,
 Sed estas Li eĉ „Filo Dia“! Tamen
 Sufiĉe alte flugas tiu judo!

Prokulo.

Per viaj vortoj vi min dolorigas:
 Ne kredu, sed ne moku!

Centestro.

La reganto

De l' vortoj „Filo Dia“ konfuziĝis,
 La juĝejon iris li kaj diris,
 Ke tien mi Jesuon enkonduku.
 La Akuzato malfeliĉa ŝajne
 Al li inspiris respektplenan timon,
 Kaj por kun Li ne resti nur duope,
 Pilat' al mi ordonis ne foriri.
 [Per voĉ' tremanta Lin Pilat' demandis:
 — „De kie estas Vi?“ — Sed nur silento
 Respondis lin. — „Pro kio Vi silentas“, —
 Al Li li diris: — „Ĉu do Vi ne scias,
 Ke rajtas mi krucumi Vin kaj rajtas
 Vin liberigi!“ — Kaj Jesuo diris:
 — „Pri Mi ĉe vi nenia rajto estus,

Se ĝin ne havus vi de supre.
 Do plian pekon havas tiu, kiu
 Perfidis min“. — Kaj post ĉi tiuj vortoj]
 Reiris al popol' la prokuristo, —
 Permesu, ke malfermu mi ĉi pordon.

(Li malfermas la unuan pordon dekstre.
 Bruo de voĉoj estas pli aŭdebla.)

De tie ĉi vi povas bone vidi
 Pavimon tutan. Vidu, kiel varme
 Kun la popol' disputas la reganto.
 Ankoraŭ pli obstine, ol antaŭe,
 Pretekston serĉas li, por liberigi
 Jesuon.

(Prokulo aliras al la pordo. Johanino kaj
 Lio sekvas ŝin.)

SCENO DUDEK UNUA.

Voĉo de sadukeo (post la kulisoj).

Nun se vi Lin liberigos,
 Vi veĝa malamiko estos!

Voĉo de l-a fariseo.

Tial,
 Ke ĉiu, kiu sin la reĝo nomas,
 La reĝa malamiko estas!

Johanino.

Vidu,
Ektremis kaj paliĝis la reganto.

Prokulo.

Li signon donis al la tribunulo ...

Centestro.

Ordonas li Jesuon elkonduki.

Johanino.

De l' pretorio pordo malfermiĝis ...
Kondukas oni Lin ...

Lio.

Terure!

Prokulo.

Kion,

Ho, dioj, ili faris!

(Por ne fali svene, ŝi apogas sin
al la kolono. Johanino kaj Lio penas
ne allasi ŝin al la pordo.)

Prefekto.

Ŝi ne povas
Rigardi la Malfeliĉulon!

Lio.

Fermu
La pordon pli rapide!

(Centestro fermas la pordon.)

Johanino.

Ne allasu
Ŝin al la pordo!

Prokulo.

Mi rekonsciiĝas ...
Mi sentas min pli bone ... Ho, permesu!
De tenu min!

(La pordo ree malfermiĝas. Rapidege en-
kuras Aleksandro, kaptas de sur la tablo la
kruĉon kun lavujo kaj kuras al la fontano, por
ekĉerpi akvon. La pordo restas malfermita.)

SCENO DUDEK DUA.

Voĉo de Pilato (moke).

Li estas via Reĝo!

Prokulo.

Mi aŭdas voĉon de Pontio! Lasu!

Johanino.

Mi petas, ne aliru al la pordo!

Voĉoj de l' popolo.

1-a.

Vi prenu Lin!

2-a.

Krucumu Lin!

3-a.

Krucumu!

Lio.

Vi kion faras? Kaj por kio akvo?

Aleksandro.

Ordonis doni akvon la sinjoro.

(Li forkuras.)

SCENO DUDEK TRIA.

Voco de sadukeo.

Al mort'!

Voĉo de 1-a fariseo.

Sur krucon!

Voĉo de 2-a.

Prenu Lin!

Voĉo de 3-a.

Krucumu!

Voĉo de Pilato (kun maldolĉa moko).

Ĉu vian Reĝon mi krucumu?

Prokulo.

Aŭdu!

Parolas mia edzo!

Johanino.

Trankviliĝu!

Prokulo, singardeme!

Voĉo de 1-a fariseo.

Ni ne konas

La reĝon!

Voĉo de 2-a.

[Ni ne havas reĝon!]

Voĉo de 3-a.

Reĝon

Ni ne bezonas!

Voĉo de sadukeo.

Havas ni la reĝon!

Prokulo (liberigante sin).

Forlasu!.. Lasu min al tiu pordo!

Forlasu do! Mi ĉion volas vidi!

(Krioj silentiĝas).

Voĉo de Pilato (post silento).

La manojn lavas mi, por signi tion,

Ke mi ne estas kulpa je la sango

De la Justulo. Nun vi mem respondos!

Voĉo de l' popolo.

Sur nin kaj niajn idojn Lia sango!

(La kurteno rapide malleviĝas.)

A K T O T R I A.

BILDO UNUA.

La domo kaj ĝardeno de Jozefo Arimatea ĉe la alta urba muro, tute kovrita per hedero kaj verdaĵo, kaj okupanta la tutan scenejon dekstre. De tiu ĉi muro en la fundo sub rekta angulo etendiĝas oblikve tra la tuta scenejo maldekstren ŝtona barilo de la ĝardeno, kiu dividas ĝin de la nevidata por rigardantoj vojo, kiu kondukas post la barilo laŭ ĝia longeco de la elirejo el urba pordego, kiu estas vidata nur en sia supra parto en la fundo post la barilo kaj urba muro super la formata per ili angulo. Maldekstre elstariĝas nur malgranda alkonstruaĵo de l' domo de Jozefo kun plata tegmento sub multkolora tendo. Sur tiu ĉi tegmento staras du kanapoj, tablo, leda korbo kun rulaĵoj de Malnova Testamento. La sidlokoj kaj la tablo estas kovritaj per multekostaj tapiŝoj. La domo aliĝas al la supredirita barilo. De sur la tegmento kondukas ŝtonaj ŝtupoj al placeto, aligita al la sama barilo. Tie ĉi staras ŝtona benko. Al persono, staranta sur la placeto, la barilo altiĝas preskaŭ ĝis la ŝultroj, kaj tial li povas vidi la vojon. De la placeto al la ĝardeno kondukas kelkaj ŝtupoj. En la angulo dekstre funde estas akvujo. Inter ĝi kaj la ŝtupoj de la placeto kaj sur la tegmento troviĝas pordeto, kondukanta al la vojo. Dekstre sur la antaŭscenejo — trairejo en la fundon de la ĝardeno. En la ĝardeno — vazoj, benkoj, floroj. Preskaŭ tagmezo. Suna vetero.

SCENO UNUA.

(Jozefo sidas sur la tegmento, legante rulaĵon de leĝo. Nikodemo malrapide supreniras al li laŭ la ŝtupoj.)

Jozefo.

Ha, estas vi, amiko mia kara!

Mi estas ĝoja, ke vi fine ree

Vizitis min! Sidiĝu, Nikodemo,

Ĉi tie, jen. De longe mi jam volis

Kun vi interparoli tutanime.

Ĉu kredas vi, amiko, lastan tempon

Mi tute vin ne povas plu rekoni:

[En vi sin kaŝas io; vi sulkiĝas,

Vi estas distra, vi silentas ĉiam,

Ne respondante ofte la demandojn,

De ĉiuj vi foriras. Frat' — amiko,]

Ne kaŝu vin kaj diru: kio estas?

Nikodemo.

Jozefo kara! Vi divenis vere, —

En mi krule, longe bataladas

Du kontraŭuloj...

Jozefo.

Jes, mi tion vidas.

Nikodemo.

En mi la koro kun racio ĉiam

Batalis, sed neniam ĉi batalo

Krule tiel min turmentis, kiel

Dum tiuj lastaj tagoj — eĉ ne tagoj —

Dum kelkaj horoj post la nokt' pasinta...

Jozefo.

Sed kio? Juĝ' subita pri la Majstro

Kaj mortverdikto...

Nikodemo.

Ne, ne nur ĉi tio...

Terure estas, ke... ke mi...

Jozefo.

Do kio?

Nikodemo.

Terure estas, ke mi — ne komprenas.

Ho, kiel turmentige — ne kompreni:

[Mi mem kelkfoje havis strangan senton,

Ke mi esperon flegas pri Jesuo

En la anim'. Al mi tre ofte ŝajnis,

Ke estas Li Mesio promesita,

Ke Li dejetos idolistan jugon,

Popolon Izraelan liberigos,

Gloriĝos, sur la tronon de Davido

Eksidos kaj de sur altaĵ' Ciona
 Eterne super ni reĝanta estos.
 Sed jen la temp' de l' sankta ĝojo venis,
 Antaŭvespero de la granda Pasko —
 Kaj la espero lasta malaperis!
 Jozefo kara, certe vi memoras:
 Tri jarojn antaŭ nuna tempo nokte
 Sekrete mi Lin estis vizitinta.
 Sed vi ne scias, kial mi ĝin faris;
 Do aŭdu. — Kun la tuta fort' de l' kredo]
 Delonge, jam de l' junaj jaroj studas
 La religion mi kaj diordonojn.
 Kaj ju pli funde mi penetras ilin,
 Mi des pli klare, des pli evidente
 Komprenas kaj profunde konvinkiĝas,
 Ke falsa estas tiu vojo, kiun
 Leĝistoj kaj kleruloj niaj iras.

Jozefo.

Do kien ili iras?

Nikodemo.

Mi ne scias!

Sed ne al Dio.

Jozefo.

Kio? Vi kuraĝas

Paroli tion? Vi, la estro juda,

La instruanto Izraela, — kiel
 Vi povas tion diri?

Nikodemo.

Jes, mi diras;

Mi diras, ĉar la leĝo de Moseo,
 La profetadoj kaj legendoj niaj,
 Kaj tuta nia sankta religio
 Al mi tre karaj kaj proksimaj estas.
 En ili estas vero, vivo, Dio!
 Kaj nur en ili, sed ne en klarigoj
 De l' pastroj, leĝkleruloj kaj levidoj.
 Ĉu havas kredon ĉiuj tiuj membroj
 De l' sinedrio, tiuj fariseoj
 Kaj sadukeoj?

Jozefo.

Kie do ĝi estas?

Kaj kiu kredas?

Nikodemo.

Kiu? — Nur infanoj.

Tre bone mi memoras min infano.
 Ho, kiel mi profunde kredis Dion!
 Al Li per amo pura kaj varmega
 Infana mia koro ĉiam flamis.
 Li flugis super mi en ia ĉielo,
 Min per bluaĵo neŝanĝema ĝia

Li ombris, tiutempe Li min amis.
 Al Li mi preĝis, — ne, eĉ mi ne preĝis:
 Ankoraŭ tiam homoj ne instruis
 Min preĝi. Al altaĵ' ĉi tiu blua
 Mi tiris min anime kaj mi ploris.
 Jes, ploris pro neesprimebla ravo
 Per la ĝojigaj, feliĉigaj larmoj,
 Kaj tiuj larmoj estis kunigantaj
 Min kun Kreinto mia. — Diru, kara,
 Ĉu ni ne ĉiuj ankaŭ travivadas
 La samajn sentojn dum infanaj jaroj?
 Kaj nun respondu: kion do studadas
 Infanoj niaj?

Jozefo.

Jen demando! Kion?
 Le kredon al eterna vera Dio,
 Leĝaron Lian, la ordonojn Diajn...

Nikodemo.

Ne tion, ne, Jozefo, ne, ne tion!
 Per elpensajoj de la seka scio
 Jam de tre longe oni anstataŭis
 La sanktajn leĝojn kaj ordonojn Diajn;
 Ĉe ni anstataŭ kredo rito reĝas,
 Anstataŭ Dio — nia sinedrio.

Jozefo.

Rekonsciiĝu, Nikodemo! Kion

Parolas vi? La sanktan Dian veron
 Kaj kredon niaj pastroj bone gardas.

Nikodemo.

La pastroj!? Sed ĉu bone vi pripensis
 Jozefo, tion, kion ili faris
 Nun kun ĉi tiu sankta Dia vero?
 En la Sanktejo ili ĝin forkaŝis
 Post la kurteno lukse elteksita,
 Kaj, per arĝent' kaj oro kateninte
 Kaj ornaminte per juveloj belaj,
 Ĝin nebuligis per la timiano.
 Jen kion ili faris kun la vero!
 [Ĉu vi do vidas Dion, Izraelo?
 Atentas Lin, popolo elektita?
 Ne vidas kaj ne aŭdas? — Ne necese!
 Des pli gardata estas nia vero,
 Des pli fortike, certe, sendanĝere
 Plenumas ni revelacion Dian].
 Popolo estas malbenita! Restu
 Ĝi malklerulo en la leĝo. Estas
 Por ĝi sufiĉaj pago de impostoj
 Kaj la reguloj delikataj, kiel
 La purigadon kaj oferojn fari
 Kaj kiel respektigi la sabaton.

Jozefo.

Amiko Nikodemo! pli trankvile
 Sen timo nun mi vin aŭskultas. Dume

Komence pensis mi, ke ŝanceliĝas
 Vi mem en kredo pri la Dia vero;
 [Kaj pro la timo, ho amiko mia,
 Ektremis tre dolore mia koro].
 Sed vidas mi, ke kredas vi fortike.
 [Pri la popolo simpla vi suferas.
 Kaj tiun suferadon mi korsentas].
 — Aŭskultu: ĵus ĉi tie vi min trovis
 Ĉe la legado de profet' Jesajo.
 Disvolu do rulaĵon — ne, ne tiun, —
 Alian, jen ĉi tiun. — Donu! Vidu,
 Jen tie ĉi: „pro kio multaj viaj
 Oferoj sangaj? Tiel diras Dio.
 Min bruligado de ŝafidoj multaj
 Kaj de bovidoj grasaj' trosatigis.
 Mi tute ne bezonas tiun sangon“ ...

Nikodemo.

Jozefo, ĉu ne strange? Jen respondo
 Al mia penso. La Plejsupra Dio
 Per buŝo de profeto Sia diras,
 Ke malnoviĝis la antaŭa kredo.

Jozefo.

Mi kredas, jes; jam baldaŭ venos tempo,
 Dum kiu ne en urbo de Davido,
 Ne nur en tiu ĉi luksega templo,
 Sed kie ajn sub la ĉielo larĝa
 Al la Kreint' de l' mondoj, al la Patro,

Simile al infanoj, ni sincere
 Preĝados ĉie en spirito sankta
 Kaj en la vero.

Nikodemo.

Ree mi ĝojegas,
 Aŭdante viajn vortojn. Mi rekonas
 La sanktajn vortojn de Jesuo. Kredas
 Anime mi, kaj mense, kaj per koro,
 Ke de l' ĉielo estas Li sendita,
 Por ke Li faru novan testamenton.
 Li estas do Mesio promesita,
 Sendube!.. — Sed apenaŭ ekmemoras
 Mi sinedrion, juĝon kaj Pilaton,
 Esploron kaj ĉi tiun mortverdikton, —
 Mi, kiel aglo mortpafita, falas
 Kun la flugiloj mallevitaj teren
 En mallumegan maron de la duboj.

Jozefo.

Ne plendu, ho amiko, — sed esperu.
 Atendu, kara! Ne antaŭdivenu
 La Dian volon de la Providenco!

(Eniras servanto.)

SCENO DUA.

Servanto.

Tagmanĝo estas preta!

Jozefo (al Nikodemo).

Restu, kara

Amiko, kaj kun mi tagmanĝu kune!

(Ĉiuj tri foriras maldekstren.)

SCENO TRIA.

(Dekstre, el la fundo de l' ĝardeno eniras:
Simono, Rufo, Bartimeo kun ĝardenaj iloj).

Simono (forviŝante la ŝviton).

Ho, kiel varme estas en kamparo!
Hieraŭ de la suproj de Libano
Per neĝo kaj malvarmo vento blovis;
Sennuba nokt' ankoraŭ estis frosta,
Kaj nun, tagmeze, estas jam varmege.

Rufo.

Sur la flugiloj de hirundoj flugas
Printempo! Vidu, patro, du el ili
Klopodas jam ĉe la malnova nesto.
Multjare ili tien ĉi alflugas!
Kaj jen, sub vaz', purpura hiacinto,
Per suno varmigita, estas preta
Malfermi jam ruĝetajn siajn buklojn.

Simono.

Ho, jes, al ni denove La Plejsupra
Printempon gajan kaj feliĉan sendas!
Sentante la spiradon ĝian varman,
Al la ĉiel' sin tiras el herbaro
Trunketoj de lilioj neĝeblankaj.
Ho, se al nia fest' disflorus ili!
La mastro amas ilin. Ne, ĝis morgaŭ
Ne floros ili.

Bartimeo.

Ho, feliĉo kia!

Mi per okuloj miaj ree vidas
Belecon brilan de la mondo Dia,
La sunon, la hirundojn kaj la florojn!

Simono.

[Jes Bartimeo! De l' ĉiel' postnuba
Blindecon vian Dio ekrimarkis,
Kaj al la Majstro nia vi permesis
De ĝi okulojn viajn liberigi.
Kaj sur la tero, kiel en ĉielo,
Zorgema, malavara bonfaranto
Al vi en la mizero ŝarĝa helpis.
Bonega mastro nia! Lia nomo
Benata estu! Kiom li da larmoj
Per sia bonfarema mano viŝis!
Multegaj estas orfoj kaj vidvinoj,
Al kiuj ĉiam estas li favora.

Rufo.

Ne multaj estas en Jeruzalemo
Sinjoroj, similantaj al Jozefo.
Li kaj amiko lia Nikodemo,
Kun kiu li sur la tegmento estis,
Sendube en la tuta sinedrio
Al si similaj laŭ boneco kora
Ne povas trovi.

Simono.

Jes, la mastro havas
Amikon efektive plej ŝatindan].

(Frapo en la pordeto.)

Jen iu frapas tie. — Ruf', malfermu!

(Rufo malfermas la pordeton. Eniras Johanino.)

SCENO KVARA.

Johanino.

La mastro hejme? Mi aferon havas.

Simono.

Jes, hejme, sinjorino! Ĉiam ĝojas]
Li vidi vin. Li nun kun Nikodemo
Tagmanĝas.

Johanino.

. Ha, Simono! Bonan tagon!
Kun la sciig' malbona de Pilato
Mi venas. Kiel min ĉagrenas, karaj,
Al vi anonci pri malĝojo granda.

Simono.

Ho, sinjorino, ĉion mi aŭskultas.

Rufo.

Sciigu, kio estas, sinjorino!

Bartimeo.

Ĉu al Jesuo malfeliĉ' okazis?

Johanino.

Divenis vi. Li estas krucumota.
En tiu strato, tra pordego tiu
Al ekzekut' Lin oni tuj kondukos.

Rufo.

Ne estas eble!

Simono.

Kiel? Ho, la Majstro!..

Bartimeo.

Ne povas Li senhonorige morti
Sur kruco!

Rufo.

Ho, pardonu, sinjorino!
Sed ĉi sciigo tiel terurigas
Animon mian, ke eĉ mi ne kredas.

Bartimeo.

Verulo estas Li! Miraklojn faras!

Simono.

Ne estas Li kapabla al malbono!

Rufo.

Lin ekzekuti! Tiel ekzekuti!

Johanino.

Ho, se mi ankaŭ mem ne kredi povus,
Ke tio estas vero, ke hodiaŭ
La ekzekut' okazos!

Bartimeo.

Dio, kial
Mi ree per okuloj miaj vidas!

Ho, se denove ili ekblindiĝus,
Por ke ne vidu mi turmentojn Liajn!

Simono.

Ĉu vi memoras, Rufo, kiam antaŭ
Kvin tagoj ŝajne ĉe la templo tenis
Mi azeninon, dum de ŝi foriĝis,
Min rigardinte, Majstro, Kiu diris,
Ke Li de mi atendas duan servon.

Rufo.

Memoras mi; al vi mi tiam diris,
Ke Liaj vortoj ĉiam plenumiĝas.
Nun ili ankaŭ devas plenumiĝi!

(Sur la tegmento aperas Jozefo kaj
Nikodemo; Simono, Rufo kaj Bartimeo
komencas ĝardenan laboradon.)

SCENO KVINA.

Johanino (supreniras laŭ la ŝtupoj).

Kaj jen la mastro!

Jozefo.

Kiu tie estas?

Ha, Johanino! La gastino kara!

(Malsupreniras al ŝi renkonte sur la placeton.)

Vi venas de Pilato? Kio nova?

Johanino.

Malbone. Post tre longa hezitado
Konfirmis mortverdikton la reganto.

Nikodemo.

Finita estas ĉio!

Johanino.

Militistoj

Preparas jam senhonorigan krucon.
Al vi mi venis rekte de Pilato
El la palac' laŭ peto de Prokulo.
Ŝi estas senespera! Ŝi min petis
Al ŝi rakonti, kion ni ekvidos.

(Dekstre post la kulisoj bruo de l' al-
proksimiĝanta popolamaso. Simono, Rufo
kaj Bartimeo forlasas la laboron. Simono
aliras al la pordeto kaj rigardas tra ĝi la
straton. Rufo sekvas lin. Bartimeo supren-
kuras laŭ la ŝtupoj kaj rigardas trans la
muron.)

SCENO SESA.

Simono.

Kondukas oni! (krio).

Rufo.

Sur la strato iras
Jen la popolamaso.

Bartimeo.

Polvo...
Jen militistoj, kaj herold' antaŭe.

Johanino.

[Ha! Aŭdu, malproksime, kiel bruo
De ondoj, al la bord' kurantaj, estas
Aŭdata krio de l' popolamaso].
Mi tremas, ho, Jozefo! Jen... Proksime!..
Ho, se nenion aŭdus mi kaj vidus!

Jozefo.

Kuraĝu!

Johanino.

Dio Supra min fortigu!

Nikodemo.

Ni preĝu do!

Voĉo de heroldo

(post la kulisoj dekstre mal-
proksime, tirate, kantante).

Jesu' Nazaretano

Judea Reĝo!

Bartimeo.

Jen heroldo krias.

Simono.

Mi aŭdas, aŭdas!

Nikodemo.

Ho, la plej kruela

Popolo Izraela! Plej obstina!
La filoj de l' pereco, vi forgesis,
Forlasis Dion! Eĉ kolero Lia
Flamanta ne instruis vin subiĝi
Al Dia sankta volo senproteste.
[Dum Li vin elkondukis el Egipto
Kaj antaŭ vi disiĝis larĝa maro,
Dum en dezert' severa vi vagadis
Kaj via estr' — profeto sub la fulmoj,
Sub la minaca tondro, en nubegoj
Sur la altaĵo de l' fumanta monto
Kun la Kreinto kvardek tagojn restis,

Vi kion faris tiam en la valo?
El oro tiam vi idolon fandis
Kaj ĉirkaŭ ĝi vi furioze dancis,
En abomenaj ludoj diboĉante.
Indulgis vin Kreinto kaj pardonis.
Kaj kiel vi Lin dankis pro indulgo?]
Al vi profetojn estis Li sendanta
Tre saĝajn, justajn, — nu kaj vi? Vi pelis
De urb' al urbo ilin, ilin ekzekutis.
Do, nun ankoraŭ vi aldonu agojn
De viaj patroj! Sola, lasta restas
De Di' al vi sendito el ĉielo
Sur teron, por prediki pacon, amon.
Moseo en dezerto suprenlevis
Serpenton, — same vi Jesuon levas
Sur krucon. Sed neniam tiu peko
Al vi kaj viaj idoj estos pardonita!

(La bruo de l' popolamaso, ĉiam pli
proksimiĝanta kaj plifortiĝanta dum la
parolo de Nikodemo, nun estas jam
aŭdata sur la scenejo post la muro
dekstre.)

Johanino (kaptante la manon de Jozefo).

Jen Li!

Jozefo.

La profetado plenumiĝis:
„Li estas Hom', malsanon suferinta,

Kovrita per la vundoj... Forŝirita
De l' tero de vivantoj... Pro la krimoj
De homoj Miaj al la morto iras! "...

Simono.

Laciĝis Li sub ŝarĝo de la kruco...

Bartimeo.

Li senfortiĝis..

Rufo.

Ŝanceliĝis...

Johanino.

Ha!... (Krio).

Simono.

Jen falis nia Majstr'!

(Rapide forkuras tra la pordeto.)

SCENO SEPA.

Voĉo de sadukeo (post la muro).

Antaŭen!

Voĉo de 1-a fariseo. (post la muro).

Iru!

Voĉo de centestro (post la muro, kompateme).

Li tute malfortiĝis...

Bartimeo (al Rufo, transkuranta al la maldekstra rando
de l' placeto kaj rigardante trans la muron).

Via patro

La krucon prenis.

Voĉo de centestro (post la muro).

Nu, se vi la krucon

Jam prenis, vi do post la Kondamnito
Ĝin portu.

Voĉo de 2-a fariseo (post la muro).

Levu vin!

Voĉo de 1-a.

Leviĝu!

Voĉo de 3-a.

Estas

Ne ĝustatempe kuŝi nun!

Voĉo de sadukeo.

Aliajn

Vi savis, sed Vin mem ne povas savi!

Johanino.

Ho, tiuj fariseoj!

Rufo.

Sangsuĉantoj!

Bartimeo.

Ho, monstroj!

Voĉo de centestro (post la muro, kompateme).

Kiu ajn el militistoj,
Vi devas do Lin helpi de l' sur tero
Leviĝi.

Nicodemo.

Jen, romano, la centestro,
Li estas idolist', sed pli homama,
Ol la kredantaj solan veran Dion
Hebreoj!

Voĉo de heroldo (post la mezo de l' muro).

Jesu' Nazaretano,
Judea Reĝo!

(Bruo de l' popolo estas aŭdata jam
post la mezo de l' muro, ĉiam
direktante sin maldekstren.)

Rufo.

Portas patro mia

Post Li la ŝarĝan krucon. Jen do kia
Komplez' antaŭdirita devis esti!
Parolo Lia plenumiĝis!

Bartimeo.

Oni

Ne solan Lin al ekzekut' kondukas:
Rigardu, jen post Li sub peza kruco
Ankoraŭ unu kondamnito iras.

Rufo.

Kaj jen la dua, ankaŭ trenas krucon.

Bartimeo.

Sed kiu ili estas?

Rufo.

Mi rekonas:
La kunkulpuloj de l' rabist' Barabo.

Johanino.

Jozefo, vidu: jen sin apoginte
Sur brakon de discipl' amata Lia,
Post Li Mario, la Patrino, iras.
Ho, la malĝojo, kvazaŭ glavo, trae
Elturmentitan Ŝian koron pikas!

Jozefo.

Sopiro de patrinaj de l' tutmondo

Pri la infanoj per sopiro Ŝia
Nun por eterne estas sanktigita!
Ni sekvu Ŝin!

Johanino.

Ni sekvu Ŝin, Jozefo!

(Ili rapide malsupreniĝas kaj foriras
tra la pordeto. Rufo sekvas post ili.)

SCENO OKA.

(Bartimeo ploregas, apoginte sin al la muro.)

Nikodemo (postrigardante la procesion, genufleksas).

Kaj la kolero Dia ne ektondris!...

Al la anĝeloj ne ordonis Dio

Jesuon de l' krimuloj liberigi!...

Kun Sia dorna krono al la kruco

Li post momento estos alnajtita!

De nun, la promesita Reĝ', ne regos

Li en Cion'.

Voĉo de heroldo (post la muro, maldekstre).

Jesu Nazaretano,

Judea Reĝo!

Kurteno.

BILDO DUA.

Ĉe Pilato. Riĉa ĉambro. En la mezo kelkaj larĝaj ŝtupoj kondukas al arko, post kiu troviĝas „triklinio“, — profunda duonronda ejo sub arkaĵo. Sur ambaŭ flankoj de l' arko po unu pordo. Meze de la triklinio — lukse aranĝita tablo, plena da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Abundo da floroj. Riĉa vazaro. Ĉirkaŭ la tablo kuŝetas sur eburaj kuŝejoj: Pilato, prefekto kaj ambaŭ tribunuloj. Prokulo sidas sur la kuŝejo kontraŭ Pilato. Krepusko, ebliganta tamen sufiĉe klare vidi la objektojn. Iom post iom ĉiam pli mallumiĝas. Aleksandro kaj sklavoj servas.

SCENO UNUA.

1-a tribunulo.

Tri horoj ne forpasis post tagmezo,
Sed suno malaperis.

2-a.

La krepusko

Neordinara

1-a.

Ĉiam mallumiĝas

Krepusk' mistera.

Prefekto (moke).

La mistero estas,
Ke nun la sun' eklipsis de la luno.

Prokulo.

Ĝi en ĉiel' sennuba estingiĝis
Precize, kiam oni ekzekuton
Komencis.

SCENO DUA.

Voĉo (post la kulisoj tre malproksime,
kantante kaj malĝojige).

Pri ekzekutatoj preĝul

1-a tribunulo.

Denove!

2-a.

Ree ĉi minaca voĉo!

1-a.

Ĝi kio estas?

Pilato.

Estas tia moro:
Dum oni ekzekutas, ĉiam krias

Levido al urbanoj de sur turo,
Ke pri ekzekutato ili preĝu.

Prokulo.

Pontio, vi ankoraŭ havas tempon,
Por nun korekti vian grandan pekon.
Verdikton vian povas vi nuligi.
Rapide sendu tien, al ĉi tiu
Golgoto terurega Aleksandron
Aŭ kiun ajn alian al centestro.
Mi petas vin, pro ĉio, kio estas
Por vi plej kara en la mondo! Sendu!
Transdonu tie li ordonon vian,
Ke oni interrompu ekzekuton.

Pilato.

Neeblan petas vi. Vi opinias
Virine. Estas ne konvene fari
Verdiktojn kaj nuligi poste ilin.
Potenco firma tion ne permesas.

Prokulo.

Sed vi, Pontio, mem la Kondamniton
Senkulpa opinias.

Pilato.

Estas kaŭzoj,
Nekompreneblaj por virina saĝo.

En tio estas la utilo regna.
Cetere, kian intereson havas
Matrono roma pri hebreo tiu?

Prokulo (mallaŭte al Aleksandro).

Ho, kiel malrapidas Lio! Iru,
Eksciu, Aleksandro, ĉu revenis
Ŝi kun sciigoj? Mi delonge sendis
Ŝin tien.

Aleksandro.

Mi ekscios, sinjorino!

(Li foriras dekstren.)

SCENO TRIA.

Prefekto (mallaŭte al Pilato).

Ŝi nur pri tiu ekzekut' terura
Nun pensas ĉiam. Oni devas provi
Ŝin distri per amuza babilado.

Pilato.

Ni ankaŭ aŭdos. (Al la sklavo.) Al la gastoj vinon
Enversu!

Voĉo (post la kulisoj).

Pri ekzekutatoj preĝu!

1-a tribunulo.

Ho, kiel malĝojigas la animon
Malgaja tiu voĉo!

2-a.

Egiptanoj

Dum la festenoj gajaj al la gastoj
Mumion en salonon enportigas —
Por memorigo pri venonta morto.
Kaj jen ĉi tiu voĉ' malgaja ankaŭ
Anoncas pri la fin' neevitebla.

(Prokulo, ĝis nun ne atentinta
la festenantojn, atente aŭskultas
la vortojn de l' dua tribunulo.)

1-a.

Rigardu! Ĉiam pli kaj pli nigriĝas.

2-a.

Anstataŭ tago nokt' fariĝis.

1-a.

Povas

Mi malfacile vidi.

Pilato.

Donu lumon!

(La sklavoj ekbruligas lumingojn.)

Prefekto.

Ĉe flamo de lumingo kiel hele
Smeraldoj brilas en la ĉirkaŭkolo
De nia sinjorino! Mi memoras
Lolion; kiam ŝia edzo, nepo
Kaj heredant' de l' reĝo, ŝin forlasis,
Ŝi tuj senpene trovis la alian
Ne eminentan edzon. Mi ĉeestis
La geedziĝ — festenon. Oni metis
Smeraldojn, perlojn sur la fianĉinon
Por kvardek milionoj da sestercoj.

Pilato (ridante).

Ĉu povis vi okulmezure tiel
Precize ornamaĵon ŝian taksi?

Prefekto.

Ho, ne, — pri perloj kaj juveloj estas
Ne kompetenta mi; sed tre volonte
Ŝi mem al ĉeestantoj kalkuladis
Ilian prezon.

(Eniras de dekstre Lio, post ŝi Aleksandro.)

SCENO KVARA.

Prokulo.

Ha, vi fine venis!

Sidiĝu do ĉi tie, pli proksime,
Jen sur la benko ĉe kuŝejo mia.

(Interparolas kun ŝi duonvoĉe.)

Prefekto.

Naĝante al Judeo malproksima,
Post kiam mi forlasis patran bordon,
Kaj en nebulo ĉielblua dronis
Arbaroj kaj ĝardenoj Puteolaj,
Mi pensis, ke atendas min nur mankoj,
Ke perdis mi amikojn kaj parencojn,
Ke, de l' patrujo forŝirita, estos
Mi tie ĉi viktimo de enuo.
Sed jen, ankoraŭ tago ne forpasis
Post la alveno en ĉefurbon fremdan,
Kaj mi jam kredas, ke mi estas hejme.

2-a tribunulo.

Simile, kiel sur la Palatino
En Rom', mi aŭdas la gepatrajn vortojn;
Ni estas en la ĉambroj same luksaj,
Kaj krome- ĝuas ni akcepton koran.

1-a.

Ĉu povis pensi ni, ke en Judeo
Ricevos ni tagmanĝon de Lukulo!

Prefekto.

[Jen kiajn manĝojn ni ĉi tie vidas:
La cerboj pavaj, la fenikoptero,
La mara erinac', tarentaj ostroj,
Kokinoj numidiaj kaj la fiŝo,
Kaptita certe en la Pont — Eŭkseno ...

1-a tribunulo.

Kaj kiel belaj estas tiuj fruktoj;
El korno de abundo kvazaŭ ilin
Al ni elŝutis iu: jen granatoj,
Kaj jen ĉerizoj kaj egiptaj figoj,
Jen pomoj, jen la prunoj el Damasko.

2-a.

Sed pli, ol ĉiuj fruktoj kaj frandaĵoj
Bongustas la viviga fluidaĵo —
Ĉi tiu cipra kaj ĥiosa vino;
Ĝi ŝaŭmas, flustras, bone kontentigas
Soifon kaj ekscitas nian sangon.]

Prefekto.

Kolegoj, mi pokalon suprenlevas
Por prokuristo nia!

1-a tribunulo.

Lian sanon!

2-a.

Por nia kara, bona mastr'!

Prefekto.

Mi trinkas

La sanon de edzino lia nobla!

1-a tribunulo.

Mi por Prokulo la pokalon levas!

2-a.

Mi ankaŭ!

Pilato.

Karaj militistoj! dankas

Mi vin de mi kaj de edzino mia.

Prefekto.

Nur nia sinjorino el abunda
Mangaro eĉ nenion volas tuŝi.

1-a tribunulo.

Jen antaŭ ŝi pokalo luksa brilas
Nekomencita, plena ĝis la randoj.

Prefekto.

En via domo inter la sklavinioj
Sendube estas lertaj dancistinoj.
Siriaj famaj dancoj kun la dolĉa
Muzik' de flutoj kaj agrablaj liroj
Edzinon vian certe regajigos,
Kaj eble la malĝojo ŝin forlasos.

Pilato.

Aperu tuj sklavinioj dancistinoj
Kaj la dancistoj sirianoj.

Prokulo (mallaŭte al Lio).

Kia

Turmento! Lio, Lio! Vin aŭdante,
Mi sentas, kvazaŭ akraj feraj najloj
Eniĝas en la manojn kaj piedojn.
En la elturmentita brusto frapas
Pro morta sopirado mia koro.
Kaj ĉiuj miaj pensoj, ĉiuj sentoj
Nun estas tie, ĉe l' terura kruco...
Kaj tie ĉi la rido, babilado!..
Foriros mi, por ilin ne aŭskulti.

Lio.

Atendu pacience, mi vin petas!
Ne scias ili, kion faras... Vi ja

La edzon kolerigos per foriro...
Vi restu kun la gastoj... Vin ŝajnigu
Senzorga, gaja, mia sinjorino!

(Eniras dancantaj siriaj sklavo-
j kaj sklavinioj.)

SCENO KVINA.

Prokulo.

Sed mi ne povas! Mi ne havas fortojn!...

(Sonas muziko el la ĝardeno.
La muzikistoj oni ne vidas.)

Ho, se ne vidus mi ĉi tiun dancon!...
Min forkonduku ien, mia kara!

Lio.

Mi petas vin, konservu lastajn fortojn,
Imitu Lin, kaj, kiel Li, toleru!

(Siria sklavino dancas.)

Prefekto.

Sub mildaj sonoj de lidia kanto
Ho, kiel ĉarmaj estas ŝiaj movoj!

1-a tribunulo.

Ho, kia dolĉo!

2-a.

Kiom da esprimol

Prefekto.

Pasie kurbiĝinte la talion,
 Ŝi kvazaŭ naĝas sur supraĵo glata
 De maro.

1-a tribunulo.

Eĉ Ĥaritoj nemortemaj
 Kun ŝi en gracieco ne konkuris.

2-a.

Vidante ŝiajn ĉarmojn delikatajn,
 Eĉ unu el fratinoj de Parnaso,
 Mem Terpsikoro, certe ŝin enius.

Prefekto.

Sed kiel pala estas ŝi! Ŝi tremas,
 Kaj en okuloj ŝiaj malbrilantaj
 Mi vidas ian kvazaŭ mortan timon.

Pilato.

Mi volas ion pli ĝojigan! Ĉiuj
 Nun dancu!

Voĉo (post la kulisoj).

Pri ekzekutatoj preĝu!

1-a tribunulo.

Denove!

2-a.

Ho, la bonfaranta vino!
 Ĝi forgesigas timon superstiĉan.

1-a.

Kaj tiun ĉi minacan mallumegon!
 (Siriaj sklavo kaj sklavinoj dancas.)

Prefekto.

Li dancas, kvazaŭ sonĝe, furioze,
 Kaj, kiel ŝi, kun tim' en en la vizaĝo.

1-a tribunulo.

Rabbest' viktimon tiel persekutas! ...

2-a.

Ŝi flugas sur facilaj ventflugiloj,
 Ne tuŝas preskaŭ la marmoran plankon.

1-a.

Li kaptis ŝin!

Prefekto.

Kaj ŝi elglitis.

2-a tribunulo.

Tiel

Forkuris de Plutono Prozerpino ...

Prefekto.

Sabinaninoj de l' romanoj ...

(Blindiga fulmo. Surdiga ekstondro.
Subtera obtuza bruoj. Tertremo. La
muroj kaj kolonoj ŝanceliĝas.)

2-a tribunulo.

Dioj!

(Li kuras, faletas, falas kaj kuŝas
en rigidiĝo.)

Prefekto (maltrankvile).

La fulmo, tondro kaj subtera bruoj!

(Li rapidas al elirejo en la ĝardenon
kaj apogas sin al kolono.)

Pilato (faligante la pokalon).

La tero ŝanceliĝas! (rapide leviĝas.)

1-a tribunulo (falante sur genuojn).

Ni pereas!

(Siria sklavino kun krianta plorego
forkuras; la siriano sekvas ŝin. Ekblovo
de zumanta vento. La fajroj estingiĝas.
Nepenetrebla mallumego. Longa morta
silento. Poste subite hela taga lumoj.)

SCENO SESA.

Prefekto.

Ĝi kio estis?

Pilato.

Ĉu ne estas sonĝo?

1-a tribunulo.

Mi ne komprenas.

2-a.

Sango rigidiĝas.

Prokulo (malrapide leviĝante, majeste).

Ĉu vi ĝis nun ankoraŭ ne komprenas?

Ĉu tute jam ŝtoniĝis viaj koroj?

Pontio! Vi timeme, malkuraĝe

La Senkulpulon al la morto sendis.
 Do, sciu, prokuristo de Judeo,
 Vireĝo Roma kaj amiko reĝa, —
 De nun per akvo de la tuta mondo
 Vi ne forlavos tiun monstran kulpon!
 Justulo estas Li, sendit' ĉiela,
 Li, suno de la vero, Dia filo,
 Ekpendis sur la kruco malhonora.
 Kaj miras vi, ke suno estingiĝis,
 Ke fulmoj en la mallumego brilas,
 Ke tondr' minaca bruas en ĉielo,
 Ke pro teruro tero ekstremigis. —
 Mi kredas! Min konvinkas koro mia!
 El Li forflugis Lia lasta spiro.
 Finiĝis! Dio, suferado Lia
 La pekon de la mondo elaĉetu.

(La kurteno rapide malleviĝas.)

AKTO KVARA.

La ĝardeno de Jozefo Arimatea. Maldekstre pli ol duonon de la scenejo okupas alta roko kun kondukantaj al ĝia supro elĉizitaj ŝtupoj. La roko estas kovrita per cipresoj, fruktarboj kun plena printempa floraro kaj per arbetaĵoj. Sur unu triono da alteco de l' roko estas ŝtupego, formanta placeton, en kies mezo troviĝas ŝtono, servanta kiel sidloko. Ĉe la bazo de l' roko — duonronda ŝtona benko. Dekstre en la fundo estas vidataj la urbaj muroj. Sur la antaŭscenejo dekstre — ŝtonplena monteto kun ŝtupoj. Nokto.

SCENO UNUA.

(Jozefo sidas sur la ŝtupego de l' roko. Silente eniras kaj supreniras al la pinto de l' roko tri mirhoportistinoj. Eniras Rufo kaj Bartimeo kaj metas sin ĉe la piedoj de Jozefo.)

Jozefo.

Ĉi tiu ĉerko nin allogas ĉiujn.
 La sama nin malĝojo kaj sopiro
 Kunigas... Kej fluegas niaj larmoj,
 Kaj pligrandiĝas am' al la Mortinto.

(El la fundo eniras Aleksandro kaj Lio.)

SCENO DUA.

Jozefo.

— Ĉu iras iu? Mi la paŝojn aŭdas.
Ha, estas Aleksandr' kaj Lio. — Venas
Ĉi tien vi, por plori kaj sopiri
Apud la kara antaŭtempa tombo?

Aleksandro.

Leviĝis ni pli frue, por ĝis tago
En kampojn post la urbo iri...

Lio.

Tie

Kolektis mi bonodorantajn florojn,
Unuajn idojn de l' printemp', por ilin
Disŝuti sur la tombo...

Jozefo.

Oni tien

Vin ne enlasos nun dum nokta horo.
Atendu tagon: baldaŭ mateniĝos.

Aleksandro.

Sed kiu nin, sinjoro, ne enlasos?

Jozefo.

Ha, jes, — ne scias vi, ke la gardistoj
Nun staras tie. Multepeza ŝtono
Ĉe l' pordo ĉerka estas sigelita
Per la sigeloj de la sinedrio.

Lio.

Por kio la sigeloj?

Aleksandro.

Kaj gardistoj?

Jozefo.

Ĉefpastroj niaj kaj leĝistoj timas,
Ke la disciploj eble povas ŝteli
La korpon de Jesuo dum la nokto
Kaj poste en la urbo rakontadi,
Ke reviviĝis Li.

Aleksandro.

Eĉ post la morto
La fariseojn Li maltrankviligas!

Jozefo.

Mi antaŭ du nur tagoj ne atendis,
Ke en ĝardeno mia izolita,

Ĉi tiu roko, kie mi preparis
 Por mi la lastan mian rifuĝejon,
 Azilon donos al la Suferinto.

Lio.

[Mi eble pekas, sed eĉ dum la festo
 Mi ĉiam pri la sama konsideras:
 Ne povas mi forgesi la fatalan
 Antaŭvesperon tiun de sabato:
 Obstine ĉiam mi ekrememoras
 La plej malgrandajn ĝiajn detalaĵojn.

Rufo.

Mi ankaŭ ĉiam ilin rememoras.
 Jen venis ni al la ekzekutejo;
 La krucon mia patro surterigis,
 La militistoj senvestigis Majstron,
 Kaj sur la krucon ili Lin etendis.
 Ĝis nun ankoraŭ en oreloj miaj
 Sonoras kvazaŭ frapoj de l' martelo:
 Per akraj najloj la ekzekutistoj
 Traboris Liajn manojn kaj piedojn ...
 Kaj el la vundoj ruĝa sang' ekfluis ...

Lio.

Memoras mi, sur la vizaĝo Lia
 Aperis la esprimo de l' sufero.
 Nek plendo, nek ĝemkrio, nek malbeno

El Lia buŝ' eliris. La okulojn
 Li suprenlevis kaj la Patron Supran
 Li preĝis pri pardon' al tiuj, kiuj
 Ne scias, kion ili faras.

Bartimeo.

Ambaŭ

Krimuloj, kun Justulo krucumitaj,
 Insultis Lin. El ili tamen unu
 Ekpentis kaj hontigis la alian,
 Dirinte: „Ĉu jam vi ne timas Dion?
 Ni estas kondamnitaj pro la krimoj;
 Sed Li nenian malbonaĵon faris“.
 Kaj poste Majstron petis li, preĝante:
 „Ekrememoru min, Sinjoro, kiam
 Eniros fine Vi en regnon Vian!“

Rufo.

Kaj ĉu memoras vi respondon Lian?

Bartimeo.

Ĉu oni povas tion ne memori?
 Respondis Li: „Kun Mi hodiaŭ estos
 Vi en la paradizo“.

Jozefo.

En mallumo,

Reĝinta dum tri horoj post tagmezo,

Ĉe lum' de l' torĉoj de l' ekzekutistoj,
 Patrinon Lian vidis mi ĉe l' kruco;
 Kaj ankaŭ estis plej amata Lia
 Disciplo, korsentanta la suferon,
 Premantan ŝin. Kaj Suferanto diris:
 „Patrino, nun li estas filo Via“;
 Kaj al Johano: „Jen — patrino via“,
 Kaj la disciplo, tiel filigita,
 Al si patrinon sian forkondukis.

Aleksandro.

Mi sur Golgoto ne ĉeestis, tial
 Ne scias mi la finon de l' suferoj.

Rufo.

Ho, ĉiu Lia vorto tre profunde
 Engravuriĝis en memoro mia.
 Eĉ nun mi aŭdas, kiel Li ekkriis:
 „Ho, Dio Mia! Dio Mia! Kial
 Vi Min forlasis?“

Bartimeo.

En turmento morta
 Malforte Li ekkriis: „Mi soifas!“
 Kaj spongon sorbiginte per vinagro
 Kaj ĝin metinte sur bastonon longan,
 El militistoj unu, pro kompato,
 Al Lia seka buŝo ĝin alŝovis.

Aleksandro.

Kaj dume en palaco de Pilato
 Festeno estis, oni ankaŭ trinkis!

Rufo.

Vinagron ensorbinte, antaŭ morto
 Ekĝemis Li: „Finiĝis! Patro Mia!
 Al Vi transdonas mi Spiriton Mian“ ...

Bartimeo.

Kaj kapon malleviste, Li formortis.]
 (Silento. Ĉiuj en profunda pia malĝojo
 mallevas la kapojn. Dekstre eniras Simono
 kun garbo da lilioj.)

SCENO TRIA.

Simono.

Sinjoro mia bona, ekrigardu:
 Dum tiu ĉi trankvila, varma nokto
 Lilioj ĉiuj kune ekdisfloris.

(Laŭ signo de Jozefo, Aleksandro malsu-
 preniras de sur la placeto, prenas la liliojn
 de Simono kaj portas ilin al Jozefo.)

Jozefo.

Aroma garbo de amataj Liaj
 Lilioj puraj, nokte ekflorintaj,

Donaco mia estu al la tombo
De l' kara formortinta Suferulo.
[La militistoj min ne povas malpermesi
Ornami Lian tombon per la floroj].

Lio.

Se ni ne povas veni al la tombo,
Ni devas iri hejmen, Aleksandro.

Jozefo.

Foriru pace. — Lio, viajn florojn
Vi lasu ĉe Simono. Ni matene
Forportos ilin al la maŭzoleo. —
— Kaj vi, amikoj, devas nun ekdormi.
Foriru. Tie ĉi en izoleco
Mi la autaŭmatenan preĝon faros.
(Ĉiuj foriras. Jozefo restas sola.)

SCENO KVARA.

Jozefo.

Fermitaj estas Viaj nun okuloj,
Kaj korpe Vi ekdormis jam por ĉiam,
Sed brilas el la tombo tra nebuloj
La viv', kaj estingiĝas ĝi neniam.
Viviga estas, nova kaj tre forta

En niaj koroj Via vort' senmorta:
Animo nia estas plenigita
Per am', — do morto estas forvenkita!

(Sur la supro de l' roko maldekstre
aperas la centestro.)

SCENO KVINA.

Centestro.

Jen estas vi! Kaj mi al vi rapidis.
(Li malsupreniras al Jozefo.)

Jozefo.

Al mi vi iris? Kaj ĉu estas kaŭzo
De via veno mia morta Gasto?

Centestro (ĉirkaŭrigardante).

Ĉu nin neniuj tie ĉi aŭskultos?

Jozefo.

Neniu.

Centestro.

Unu militisto mia
El tiuj, kiuj gardis ĉe la pordo
De l' tombo, al mi alkuris en tumulto
Kaj pri la mirindaĵo min sciigis:
Apenaŭ noktomezo venis, tero

Ektremis ĉirkaŭ la monteto tomba.
 Kaj iu radiluma kaj belega
 Alflugis meteore de l' ĉielo,
 Kaj de la tomb' la ŝtonon foriginte,
 Sur ĝi sidiĝis; sur la senkorpulo
 La vest' pli blanka estis, ol la neĝo,
 Kaj mem li radilumis kvazaŭ fulmo.

Jozefo.

Ho, kion aŭdas mi!

Centestro.

La militistoj
 Pro timo teren falis: ilin kaptis
 Teruro morta, glaciiga. Longe
 Ne povis ili konsciiĝi. Kiam
 La alkurinta militist' rakontis
 Al mi pri tio, li tremadis febre.
 Mi tre rapide al la tombo venis
 Kaj trovis mi la ŝtonon formetitan,
 Sed la sigeloj restis sendifektaj.
 Internen mi eniris ...

Jozefo.

Ĉu la korpo
 De Suferulo nia estas tie?

Centestro.

Ni iru kune, kaj vi mem ekvidos.

Jozefo.

Ni iru do!

(Ili rapide supreniras la rokon kaj
 malaperas maldekstre. Dekstre per
 malrapidaj paŝoj eniras Nikodemo
 kaj sidiĝas sur la benkon.)

SCENO SESA.

Nikodemo.

Ne trovas mi trankvilon!

Trompita de espero mia vana,
 Mi ĉiam restas kun sōpiro mia.
 [En la anim' vundita nur malvarmo
 Kaj vanto reĝas ... Dormo min forlasis.
 Ho, vanaj estis kredo kaj esperoj!]
 Ne Li Mesio estas promesita,
 Kaj la alian mi jam ne atendas. (Li ploras.)

(Dekstre eniras Johanino kun balzam-
 ujo en la manoj. Komenciĝas mateniĝo.)

SCENO SEPA.

Johanino.

Ha, Nikodemo! (Ŝi sidiĝas apud li.)

Ni nuntempe povas

Sopiri nur, malĝoji kaj ploregi.
 Mi iras al la tombo kun aliaj
 Virinoj galileaj, por la korpon
 Jesuan ŝmiri per bonodoraĵoj.
 Jen estas sanktoleo kaj aloo.
 — Plenumis vi por Li la lastan devon;
 Mi aŭdis en la domo de Johano,
 Ke kun Jozefo vi Lin dekrucigis?

Nikodemo.

Jes, mi plenumis la malgajan devon.
 Ŝtuparon ni almetis al la kruco.
 Eltiris najlon mi el Lia mano;
 Kaj jen senforte falis Lia brako
 Post mia ŝultr'. La kapon sangkovritan
 Sur mian bruston klinis Li, kaj pikis
 Vizaĝon mian Lia dorna krono.
 Kaj al mi ŝajnis, ke mi sentis tiam
 La ĉirkaŭprenon Lian adiaŭan.
 Konstante, ĉiam mi ekrememoras
 Momentojn tiujn; kaj la larmoj tiam
 Nevole fluas el okuloj miaj.

Johanino.

Kaj kun la viaj ankaŭ mi elverŝas
 La miajn ...

(Post la kulisoj en la fundo estas
 aŭdata ŝalmo de paŝtisto.)

Sed aŭskultu! Ŝalm' paŝtista!
 Paŝtisto el la urb' brutaron pelas.
 Ha, kiel amas mi ĉi tiujn sonojn!
 Transportas ili min en la sennuĝan
 Infanan aĝon. Aŭskultante ŝalmon,
 Mi ĉiam rememoras unu nokton
 En la patrujo. Pri ĉi tiu nokto
 En infaneco mi tre ofte aŭdis
 Rakonton tute simplan de paŝtistoj.
 Gardadis ili unufoje nokte
 Brutaron. La anĝel' aperis; [gloro
 De Di' lumigis ilin. Kaj teruro
 Atakis la paŝtistojn. Sed anĝelo,
 Kuraĝigante ilin, elparolis:
 „Ne timu! Mi anoncas grandan ĝojon
 Al vi kaj al la tuta mond': naskiĝis
 Savonto via. Jen vi havas signon:
 En la kaverno trovos vi Infanon;
 En vindoj kuŝas Li“. Kaj jen tre multaj
 Aperis en ĉielo la anĝeloj
 Kaj kantis: „Gloro en altaĵ' al Dio,
 Sur tero paco kaj al homoj beno!“
 — Kaj ĉio silentiĝis, estingiĝis
 La lum', forflugis la anĝeloj. Ili
 Laŭ lia montro iris kaj ekvidis
 Kavernon kun manĝujo kaj vinditan
 En ĝi Jesuon, Infaneton belan
 Sur brakoj de Mari', Patrino Lia. —

Nikodemo.

Pri tiu sankta nokt' en Nazareto
Memoros mond'!

Johanino.

En Betlehemo.

Nikodemo (rapide leviĝante).

Kio?

En Betlehemo?

Johanino.

Jes.

Nikodemo.

Sed ja naskiĝis

En Nazaret' Jesuo.

Johanino.

Sekve vi ne scias:

En tiu tempo reĝ' Aŭgusto faris
La registradon en la tuta lando,
Kaj ĉiu sian urbon devis iri.
Kaj do el Nazareto Galilea
Jozefo, edzo de Mario, iris
Al Betlehem' Judea, urb' Davida:
Jozefo apartenis ja al gento
De l' reĝ' Davido.

Nikodemo.

Ho, se vi nur sciis

Malĝojon mian nunan, Johanino,
Pro viaj vortoj: nur naskiĝo Lia
En Betlehem' kaj reĝa gent' Davida —
Al mi nur tiuj ĉi du signoj mankis,
Por kredi al profetaj antaŭdiroj,
Kaj ĉiuj nun kuniris sur Jesuo.
Sed ni, anstataŭ ĝoji kaj triumfi,
Nur povas la surtombajn larmojn verŝi.

Johanino.

La ŝtonon kiu de la tomb' forigos?

Ĉu vi?

(Maldekstre sur la supro de l' roko aperas
kaj iras malsupren Jozefo kaj centestro.
Mateniĝas. La ĉielo roziĝas.)

SCENO OKA.

Jozefo.

Li jam ne estas en la tombo!

Johanino.

Ĉu povas esti?

Nikodemo.

Kie do Li estas?

Centestro.

Ĉirkaŭe ni traserĉis la ĝardenon,
La korpon ni ne trovis.

Jozefo.

Ni nur vidis
Kuŝantajn en la tombo tavolojn;
Aparte, flanke de la tavoloj
Ni trovis kunvolvitan tiun tukon,
Per kiu mi kun Nikodem' hieraŭ
Envolvis Lian kapon.

Johanino.

Al la tombo
Rapidu ni.

Nikodem o.

Mi ankaŭ, Johanino.

(Johanino kaj Nikodem o rapide supreniras
la rokon kaj malaperas maldekstren.)

SCENO NAŬA.

Centestro.

Mi vidis Liajn turmentigojn, kiam
Li estis suferanta sur la kruco.

Kaj mi post morto Lia tutanime
Ekkredis, tre profunde mi ekkredis:
Li estas efektive Filo Dia!

(De dekstre eniras Simono kun floroj
de Lio, Rufo kaj Bartimeo. Ĉiuj estas
en tumulto.)

SCENO DEKA.

Simono (al Jozefo).

Sinjoro mia, jen sciigo grava:
Ĉu scias vi, ke estas for la ŝtono
Kaj malaperis korpo...

Jozefo.

Jes, Simono,
Kaj miras mi.

Bartimeo.

Sed kiu tion faris?

Jozefo.

Mi ne komprenas.

Centestro.

La disciploj eble
Dum nokto, kiam dormis la gardistoj,
Forŝtelis Lin sekrete?

Jozefo.

Sed por kio?

Simono.

Ne, la disciploj tion ĉi ne faris.
— [La sunleviĝo estas jam proksime;
Sabato pasis: devas ni komenci
En la ĝarden' kutiman laboradon.

Jozefo.

Do, tre nelonge vi ĉi nokte dormis.

Simono.

Ni ne kuŝiĝis eĉ, sinjor'. — Apenaŭ
Ni vin forlasis, ĉe la enirejo
Ni aŭdis ies paŝojn post la muro.
Mi elrigardis, kaj en duonlumo, —
Komenco estis de la mateniĝo, —
Ekkonis mi Johanon, la fiŝiston
El Galileo ...

Bartimeo.

[Li amata estas
Disciplo de Jesuo ...

Rufo.

Li nun loĝas
Ĉe la pordego kontraŭ la ĝardeno

En dua flanko de la strat' oblikve
Al via domo ...]

Simono.

Iris li de l' tombo
Emociita ... Ni de li eksciis,
Ke estas for la ŝtono, malfermita
La tombo kaj la korpo malaperis ...

Rufo.

Ni tiam mem rapide tien kuris,
Kaj ni ne trovis Lin.

Simono.

Jen estas floroj,
De Lio alportitaj; kion fari
Kun ili?

Jozefo.

Portu ilin al la tombo;
Lilioj miaj ankaŭ tie estas.

(Simono supreniras la supron de
l' roko kaj malaperas maldekstren.
Nikodemo revenas.)

SCENO DEK UNUA.

Jozefo.

Amiko mia, venu kaj ekĝoju.
 La vortoj de Jesuo plenumiĝas:
 Aperas jam adepto unu vera,
 Pri kiuj ĝojas nia Patr' ĉiela.
 Ekrememoru, nia Instruanto
 Profetis, ke, ĉielen leviĝinta
 Allogos ĉiujn Li; jen idolisto
 Konfesis Lin la Filo Dia; kredas
 La nekredema. — Estos unu sola
 Paŝtist' kaj unu sola paŝtataro!

Centestro.

[Dum Li ekzekutata estis, miaj
 Kvar militistoj disdividis
 Vestaĵojn Liajn inter si. Sed estis
 Tuniko ne kudrita, sed teksita,
 Do ĝin disŝiri ili ne deziris,
 Sed ĵetis loton! kaj la loto trafis
 Al tiu, kiu dum ĉi tiu nokto
 Sciigis min pri la okazintaĵo.
 Tunikon tiun mi de li aĉetis.]

Nikodemo (vivece).

Jozefo, vi memoras, reĝ' Davido
 En psalmo kantas: „Ili disdividas

Vestaĵojn miajn kaj pri la tuniko
 La loton ili ĵetas“...

Jozefo.

Mi memoras;
 Ankoraŭ profetado plenumiĝis.
 De Johanino aŭdis mi, ke tiu
 Tuniko, kiun vi aĉetis, estas
 Teksita de Patrino Lia.

Nikodemo.

Iris

Nun Johanino al Mari', en domon
 De la fiŝist', amato de Jesuo.

Jozefo (al Nikodemo).

Ĉu aŭdis vi, amiko, ke en tiu
 Moment' terura, kiam Li formortis,
 La muroj templaj krevis, kaj kurteno
 La tuta disŝiriĝis; la levido
 Kaj la ĉefpastroj la Sanktejon vidis,
 Kaj Sankta Dia testamento, kiun
 Eĉ ili mem ne havas rajton vidi
 Pro la minac' de morta ekzekuto,
 Aperis, tute ilin konfuzinte.

Nikodemo.

Jes, signifplena estas la apero.
 El ĝi ni tute klare devas vidi,

Ke malnoviĝis la antaŭa kredo,
 Ke ni ricevas Novan Testamenton,
 Kaj ke Jesuo, al la ter' sendita,
 Al ni ĝin portas de la Mondkreinto.]
 Jesuo estas forĵetita ŝtono,
 Sed ŝtono kiu estas fundamento.
 Li estas ŝtono de la fal' kaj tento!
 Jesuo! Vidis mi en Li Mesion,
 En Li mi vidis eminentan reĝon,
 Atendis venkon de la malamikoj,
 Atendis gloron, brilon kaj triumfon ...
 Kaj jen — la Reĝo estas dornkronita,
 Per sang' ŝprucita kruco — Lia trono,
 La morta suferado — Lia venko,
 Kaj gloro, brilo kaj triumfo — tombo ...

(Dekstre enkuras Johanino kaj tri
 mirhoportistinoj; ĉiuj estas en blankaj
 vestoj kaj brilas pro feliĉo.)

SCENO DEK DUA.

Johanino, tri mirhoportistinoj

(en la voĉo sonas ravo.)

Li vivas!

(Komuna movado. La loko lumiĝas
 per la unua radio de l' leviĝinta suno.
 La tuta ĉielo estas rozkolora.)

Jozefo.

Granda Dio!

Centestro, Rufo, Bartimeo.

Ha!

Nikodemo.

Deliro!

Ĉu estas eble?

Jozefo.

Mia antaŭsento!

Johanino.

Viviĝis Li!

Centestro.

Ĉu estas sonĝ?

Nikodemo.

De kie

Vi venis?

Rufo, Bartimeo.

Kiu do ĉi tion diris?

Johanino.

Al vi mi venas de Patrino Lia.
 Hieraŭ, kiam post la mont' sin kaŝis
 La suno, de la kara tombo venis

Mario en la domon de Johano;
 En Sia ĉambro dum silenta nokto
 Ŝi sola longe ploris pri la Filo.
 Subite per mirinda lum' ekbrilis
 La tuta ĉambr'; kaj antaŭ Si evikdis,
 Mario Sian Filon. Ŝi ekpensis,
 Ke estas songo aŭ fantom' mirinda,
 Sed staris antaŭ Ŝi Li Mem en korpo,
 Nur pli ol mortemuloj radiluma,
 Kaj la arom' de Li agrabla fluis —
 Miksaĵo de alo' kaj mirho. Manojn
 Al Li kun la feliĉo etendinte,
 Timanta tamen esti certigita,
 Mari' la harojn, ŝultrojn kaj la vangojn
 De Sia adorata Filo palpas;
 Kaj karan, tre konatan voĉon aŭdas:
 „Ne ploru nun pri Mi, Patrino kara.
 El tombo Mi leviĝis; mi gloriĝis,
 Kaj ankaŭ Vin altigos kaj glorigos,
 Kaj ĉiun, kiu Vin kun kred' kaj amo
 De nun en sia koro priglorigos.“
 Kaj Li, dirinte tion, malaperis.

(Jozefo, Johanino kaj tri mirhoportistinoj supreniras la rokon. Ili foriras.)

Nikodemo (sur genuoj).

Pardonu, Dio, mian ruzan dubon,
 Pardonu la malfortan kredon, Dio!

Kreinto mia kaj Ĉionscianto,
 Vi scias, ke la saĝo — turmentanto
 Kaj la serpento de l' fiera scio
 Al ni la koron per venen' plenigas,
 Ulceras, pikas ĝin kaj suferigas.
 Sed nun al mi, ho Dio, kredon donu
 Kaj nekredemon mian Vi pardonu.
 Ne nur por sola mi pardonon Vian
 Mi petas, sed por ĉiuj, kiuj sian
 Laboron faras nunan kaj estontan
 Kaj kiuj vivas tempon alvenontan.

Bartimeo.

Fianĉ', lasinta edziĝĉambron sian,
 Eliris el la tombo! Eklumiĝis
 La suno gaje. Kantu gloron Dian!

(Sur la supro de l' roko maldekstre aperas Simono, Aleksandro kaj Lio. Ĉiuj havas en la manoj po unu lilio.)

SCENO DEK TRIA.

Simono, Aleksandro, Lio.

Viviĝis Kristo!

Ĉiuj.

Vere reviviĝis!

Lio.

Virinoj galileaj ĵus rakontis,
Ke ili kaj kun ili Magdaleno
En val' trankvila sub cipres' renkontis
Jesumon dum krepusko de l' mateno.

(Post la monteto eksonas mallaŭta kantado de la psalmo [parolota de Jozefo en 20 lastaj strofoj]; ĝi estas aŭdata iom post iom pli dekstre.)

SCENO DEK KVARA.

(Simono, Rufo, Bartimeo kaj centestro supreniras la rokon kaj malaperas maldekstre.)

Aleksandro.

Tre multaj, kiuj estis atentantaj
La Diajn vortojn, veni ekrapidis
Kaj nur la tombon kun bonodorantaj
Lilioj belaj ili ĉiuj vidis.
Sur la bindaĵoj floroj parfumantaj
Amase kuŝis, sed po unu floro
Nur ili prenis, kaj la gelernantoj
Kantadas psalmon pri la Dia gloro.

(Simono, Aleksandro kaj Lio foriras maldekstren.)

Jozefo (sola sur la supro de l' roko).

Al vi, Jesuo, kiu reviviĝis,
Ni dankas! Venis la feliĉa horo;
Ĝi montras, ke la mondo renoviĝis,
Kaj amo reĝas en homara koro.

Glorigu Dion de l' ĉielo
Kaj kantu Lin el koro:
Pleniĝis tuta mondo bela
Per la mirinda gloro.

Glorigu Dion anĝelaro
Kaj ĉiuj senmortuloj:
La lumo hela el tombaro
Ekbrilis tra nebuloj.

Glorigu Dion de l' animo
La tuta peka tero!
Hosano! Malaperis timo
De l' morto kaj infero.

Glorigu Dion larĝa maro
Kaj ocean' senlima!
For la sopiro de l' homaro
Kaj la malĝoj' anima!

Glorigu de l' ĉielo Dion,
Glorigu Lian forton!
Krist' reviviĝis: kredu tion;
Kaj venkis Li la morton!

(La kantado aŭdiĝas pli laŭte kaj daŭras
ankoraŭ post la malleviĝo de la kurteno).

(La kurteno malleviĝas kiel eble plej malrapide.)



ESPERANTO-
PRESEJO
WILHELM LIMPert
DRESDEN-A.
MARIENSTR. 16

Książnica Podlaska

im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0001217